PUBLICATION MENSUELLE

Décembre 1960 — Janvier 1961
— N^os 195-196 —
29^e Année

REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO

FRANCA ESPERANTISTO

34, Rue de Chabrol. Paris X^e — Métro : Gare de l'Est ou Poissonnière — Tél. : PRO. 55-03.

SEMAINE PÉDAGOGIQUE ESPÉRANTISTE A PERPIGNAN



Cliché « L'indépendant du Midi ».

Une partie des assistants à la brillante réception du Centre Culturel Espérantiste, au cours de laquelle on a remis les Croix du Mérite National à Mlle Anna VIDAL et MM. René LLECH-WALTER et Robert GENDRE. (Au Centre le majoral Charles GRANDO, qui a remis les récompenses).

FRANCA ESPERANTISTO
REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO

Secrétariat :

Mlle Y. PAULIER. - Le Secrétariat est ouvert tous les jours de 9 h. à 12 h. et de 14 à 18 h. (sauf dimanches et mardis). Pour toute réponse, joindre une enveloppe timbrée à votre adresse. - **Pour tout envoi d'argent, précisez soigneusement la destination des sommes envoyées sur le talon du mandat.**

Rédaction :

M. Jean THIERRY, UEF, 34, rue de Chabrol, PARIS X^e^. Tél. : PRO. 55-03.
Tous les articles et communiqués ne peuvent être insérés qu'aux conditions suivantes : **être toujours dactylographiés** sur un seul côté de la feuille, avec une marge pour faciliter la lecture et la correction **(un double interligne)**. Tous les articles **ne se conformant pas à ces conditions seront refusés par la rédaction.**

Prière d'envoyer des clichés, et non de simples photos.

Pour toute demande de renseignements, prière de joindre **une enveloppe timbrée avec l'adresse.**

U.E.F. COTISATIONS U.E.A.

Les versements sont à effectuer au trésorier fédéral ou, à défaut, à l'U.E.F. Paris C.C.P. 855-35 Paris.

	NF
MEMBRE APPROBATEUR	1,50
MEMBRE ACTIF	3,50
MEMBRE ACTIF (avec abonnement à la « RF d'E »)	10
MEMBRE JUNIOR : moins de 21 ans* (TEJO) et **étudiants****	6
MEMBRE BIENFAITEUR UEF (avec abonnement à la « RF d'E »).	20
MEMBRE A VIE UEF (avec abonnement à la « RF d'E »)	300
Abonnement seul à la REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO	7
Pour l'étranger — Por eksterlandaj abonantoj	8
SUPPLEMENT POUR **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**	
MEMBRO JARLIBRO (reçoit l'Annuaire d'UEA)	10
MEMBRO ABONANTO (reçoit « Esperanto » et Annuaire)	20
(La kotizoj de junuloj ĝis 21 jaroj* estas respektive **5 NF** kaj **10 NF** ; nun JMJ kaj JMA estas aŭtomate TEJO-anoj ; la pliaĝaj studentoj pagas **plenan** kotizon).	
MEMBRO SUBTENANTO	30
SIMPLA ABONO AL « ESPERANTO »	15,50

Les versements concernant le Groupe des Educateurs Espérantistes sont à faire à G.E.E., 6, Rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.) C.C.P. Nantes 1501-41. Membre simple : 800 F ; de soutien : 1.000 F ; bienfaiteur : 1.200 F (8, 10 et 12 NF).

* Indiquer la date de naissance ; ** indiquer la Faculté.

S. V. P. Montrez ceci à l'un de vos amis que la question peut intéresser

SOYEZ DE VOTRE TEMPS...

A l'époque des avions à réaction, des fusées et des satellites qui laissent présager pour bientôt l'ère des *voyages interplanétaires*, le besoin d'une langue commune se fait de plus en plus sentir — non pas pour remplacer les langues nationales, comme ce serait le cas si l'on voulait imposer d'une d'elles au reste du monde — mais pour faciliter la communication orale et écrite entre tous les hommes de la terre : l'absence d'une telle langue apparaît à tout homme de bon sens comme un véritable anachronisme !

L'ESPERANTO est la langue vivante des relations culturelles mondiales, dont la valeur et l'efficacité dans les échanges internationaux ont été reconnues par l'*Unesco* lors de sa Conférence Générale de 1954.

Contribuez dès aujourd'hui à diffuser la LANGUE INTERNATIONALE.

BULLETIN D'ADHESION

NOM (en majuscules) .... Prénoms ....

Profession .... Age (facultatif) ....

Jeunes (de moins de 21 ans — date de naissance) ....

Adresse ....

.... Département ....

Montant ....

Date .... Signature ....

ZAMENHOF en Litovujo

De nia korespondanto el Kaŭnas Kl. Naudzius ni antaŭ ia tempo ricevis Esperantan tradukon de unu eltirajo el la verko de Prof. D-ro Al. Dambraŭskase « La estingiĝintaj lumiloj ». La aŭtoro en tiu skizo priskribas i.a. la restadon de L.L. Zamenhof en malgranda litova urbeto Veisiejai. Ni represas ĉi tie la vivantan bildon el la vivo de la kreinto de la Lingvo Internacia.

L.L. Zamenhof, studante en Moskvo, interkonatiĝis kun studento pri farmacio Pikover, kiu, fininte la studon, edziĝis al fratino de Zamenhof, Fania, kaj fondis en Veisiejai apotekon. Baldaŭ post tio Pikover ekmalsanis je psika malsano ; invitite de la fratino la frato de Zamenof-Leono — ekloĝis en Veisiejai, kaj poste, ricevis kuracistan diplomon ankaŭ Ludoviko Zamenhof. Komence la kuracista praktiko tie ĉi al li tute ne sukcesis, ĉar la popolo ne estis kutimiĝinta invitadi kuraciston, ne kapablante pagi viziton de kuracisto ĉe malsanulo. Krome, Zamenhof havis arogantan konkuranton — kuracist-helpanton Kukliauskis, kiu, estante loka homo, ĝuis pli grandan fidon inter la popolo. Zamenhof vizitadis nur malsanulojn en la bienoj, situantaj en ĉirkaŭaĵo.

Foje, en la printempo 1886-lin, revenantan el Gardinas (nelitova Grodno), en la vilaĝo tute apud Veisiejai haltigis virino, pro doloro ŝiranta al ŝi la harojn. Montriĝis, ke ŝia malgranda filineto, kiu malsaniĝis pro tuso, estis tute pedinta la konscion pro medikamento, donita de Kukliauskis. Zamenhof esploris la korpon de la knabineto ; ŝi dum tri horoj certe montris neniajn vivosignojn. Zamenhof komencis reviviĝadi ŝin per diversaj kuraciloj, kaj la infaneto reviviĝis. Por sia laboro li nenion prenis kaj eĉ restigis unu rublon por aĉeti vinon al la malsana infano. Baldaŭ tra la tuta regiono disvastiĝis famo pri mirakla flavruĝbarba kuracisto, kaj Zamenhof fariĝis estimata de ĉiuj. De malriĉuloj li prenadis nenian honorarion, kaj vizitante riĉajn malsanulojn, kolektadis oferojn por medikamentaĉeto al tiuj kiuj ne kapablas pagi mem.Estante bonkora, li helpadis ankaŭ aliajn homojn en malfeliĉaj okazoj. Foje forbrulis konstruaĵoj al unu terkulturisto, Zamenhof fordonis al li tutan sian monon tiel, ke revenante hejmen, li mem devis pruntepreni. En 1886 al unu hebreo Veisiejaiano, veturiganta Zamenhofon al Kaunas, falis la ĉevalo, kaj la mizerulo ploris, perdinte sian pandonanton. Zamenhof, tuŝite de liaj larmoj, donacis al li 50 rublojn por aĉeti alian ĉevalon. Alian fojon en Veisiejai li estis invitita al iu pro malario arde febranta knabino. La patrino pro doloro estis preskaŭ freneziĝinta. Dum tutaj du monatoj Zamenhof ne povis forgesi sian ploradon kaj veadon. Pro tio li decidis forlasi komunan praktikon kaj elektis specialecon de okulkuracisto. Kiel ni vidas, la Veisiejai-a vivperiodo estis periodo de gravaj ŝanĝoj kaj entreprenoj en la vivo de Zamenhof.

En 1887, reveninte el Vieno post la oftalmologia kurso, Zamenhof, kvankam li jam estis ekloĝinta en Varsovio, ofte vizitadis sian fratinon en Veisiejai kaj la tutan someron tiujaran li pasigis boatpromenante sur lago Anĉia, ĉar alimaniere li ne povis sin kaŝi de la serĉantaj pacientoj. Multe li laboris ankaŭ nokte ; ja tiam li preparis por presigo vortaron kaj gramatikon de la aperonta lingvo Esperanto. Dumsemajne li forbruligadis po 3 funtoj (1f. = 0,4095 kg) da kandeloj. El Veisiejai li ofte veturadis al Kaŭnas, kie li estis fianĉigita al Klara Silbernik, filino de unu kaŭnasa komercisto. Nome en tiu tempo la fianĉino antaŭvideme instigis Zamenhofon eldoni lernolibron de sia nova lingvo, kaj ŝia patro — estonta lia bopatro — donis al Zamenhof necesan monon por eldoni unuajn librojn esperantajn. Ofte ja okazas, ke eĉ plej bonaj ideoj restas neefektivigitaj nur pro manko de mono — kaj tial oni povas tute prave demandi, ĉu ne sole dank' al tiu ĉi helpo de Litovuja komercisto, kiu kapablis ŝati ankaŭ ideojn altajn, la mondo nun havas genian eltrovon de la 19a jarcento — Esperanton. La 14an de julio 1887 la cenzuro permesis presi la unuajn lernolibrojn esperantajn. Aŭtune de la sama jaro Zamenhof forlasis Veisiejai, kaj de tiu tempo li kaj lia edzino Litovujon vizitadis, nur gastante ĉe siaj gepatroj-gebopatroj...

legu : D-ro A. Moŭsz : « Dokumentoj de Esperanto », Berlin Ellersick pĝ. 79.

D-ro Edmont Privat : « Vivo de Zamenhof ».

(el la « Bulteno » de Esperanto-Klubo en PRAHA 2).

KANTO de STANISLAV SCULHOF

larmigis S-inon Klara ZAMENHOF

Ĉe la komenco de la Zamenofa jubilea jaro traflugis mian menson agrabla rememoro de la simpatia Klara Zamenhof. Mi havis okazon vidi ŝin kaj interparoli kun ŝi dum UK en Helsinki 1922. Estis en Malnova Studenta Domo, kie koruso — laŭ mia memoro « Suomen Laulu » direktata de Heikki Klemetti — prezentis kanton de esperantista poeto SCHULHOF, komponitan de Klemetti. S-inon Zamenhof la kanto emociis ĝis larmoj kaj ŝi varme esprimis sian admiron. (Laŭ « Esperanta Finnlando », n-ro 1-1959).

En aŭgusto de la nuna jaro la esperantistaro rememoris la 40an datrevenon de la morto de la fama poeto esperantista, kies verkon siatempe alte ŝatis la korifeo de la Esperanta poezio, K. Kalocsay. Le ĉeĥaj Esperantistoj en la datrevena monato omaĝis al D-ro Stanislav Schulhof per intima rememora solenaĵo ĉe lia tombo en Pardubice kaj metis florojn sur la lastan ripozejon de la poeto.

(el la « Bulteno » de Esperanto-Klubo en PRAHA 2).

MALGRANDIGU VIAJN IMPOSTOJN !

Estas nekutime, kiam kasisto parolas pri la maniero malgrandigi la elspezojn de liaj pagantoj.

Tamen estas nun vera fakto. Ĉar mi deziras memorigi (aŭ sciigi) al vi ĉiuj, karaj legantoj de nia revuo, kaj membroj de la Esperanto-movado, ke vi havas ĉe la mano tutsimplan rimedon por malgrandigi iom viajn inpostojn kaj grandigi viajn enspezojn.

Vi *rajtas depreni ĉiujn sumojn*, kiujn vi *donacas* al U.E.F. ĝis 0,50 % de la tuta sumo kiun vi deklaras jare al la impostkontrolisto !

NEPRE UZU TIUN BONAN OKAZON ! kaj akceptu la antaŭdankon de la Kasisto.

J. A. ROUSSEAU.

L'ESPERANTO DANS LE MONDE

SOVJETUNIO.

16-17.XII.1959 en Leningrada Sekcio de E. de Leningrada Domo de Sciencistoj, de Akademio de Sciencoj, oni organizis sciencan konferencon pri problemoj de la Lingvo Internacia Esperanto. Dum la unua kunsido faris paroladon akademiano S.V. Obruĉev, post kiu raporton pri « Vivo kaj kreado de L.L. Zamenhof » aŭdigis instruistinc G.N. Teterina. La raporto estis aŭskultita kun granda intereso. Ankaŭ tre interese prelegis docento S.N. Podkaminer pri « Problemoj de la internacia helplingvo ».

La kunveno finiĝis per artaj teatraĵoj en Esperanto. La kunvenejo estis ornamita per granda portreto de la Majstro, farita de artpentristino-samideanino V.P. Cvetkova. En antaŭsalono estis organizita ekspozicio de E-libroj. La kunvenon partoprenis 300 esperantistoj kaj gastoj.

Dua kunveno de la sekcio okazis en kverka salono de la Domo de Sciencistoj, la 17.XII. Prof. S.S. Ĉaĥotin prelegis pri temo « E. kaj problemoj de scienca normigo, teĥnika terminologio kaj dokumentado ».

Tre interesa kaj enhavriĉa estis raporto de instruistino V.V. Semenova pri temo « Aktualaj demandoj de metodika instruado de la lingvo Esperanto ».

La konferenco estis grava agado en nia E.-movado.

La 22.XII. doktoro de filologiaj sciencoj, prof. E.A. Bokarev, parolis per Moskva radiostacio pri vivo de L.L. Zamenhof.

Tre interesa kunveno de moskvaj geesp.istoj okazis la 25.XII.1959 en Moskva domo de instruistoj okaze de la centjara naskiĝtaga datreveno de D-ro Zamenhof. La kunvenon malfermis kaj antaŭparolis prof. E.A. Bokarev. Studentino de Moskva Universitato V.P. Zolotnikova prelegis pri vivo kaj kreado L.L. Zamenhof. Je nomo de Pola E.-Asocio parolis Jerzy Michalik el Gdansk. Ambasadoro de Vjetnama Popola Respubliko, Nguyen Van Kinh en E. salutis la ĉeestantojn je nomo de vjetnamaj esp-istoj. Li tralegis alvokon de ĉinaj sciencistoj al sciencistoj de la tuta mondo pri neceso de aplikado de lingvo E. por sciencaj celoj.

Interesegajn rememorojn pri fama rusa verkisto Maksim Gorkij rakontis lia estinta sekretario k-do L.S. Ŝkapa. Li tralegis ĉapitron el sia nova libro pri M. Gorkij, nomitan « Estonteco apartenas al Esperanto ». Kandidato de historiaj sciencoj N.A. Elizarova rakontis pri sia laboro en arĥivo de konata tradukintino esperantá kaj amikino de L.L. Zamenhof — de M.I. Ŝidlovskaja, kiu tradukis en E.-on pli ol 100 verkojn de rusaj klasikaj verkistoj. Elizarova tralegis leteron de la Majstro al prezidanto de la unua E.-kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovitan de ŝi en la arĥivoj de M.I. Ŝidlovskaja. La raportantino sciigis, ke ŝi trovis dokumentojn, kiuj certigis pri scio kaj uzado de E. de konataj rusaj komponisto Taneev kaj verkisto V.G. Korolenko.

Konata sovjeta esp-ino N.I. Nikiforova raportis pri pri « E. kaj rusa literaturo ». Ŝi kolektis pli ol du mil titolojn de rusaj klasikaj verkoj tradukitaj en E-on.

D-ro de filologiaj sciencoj, prof. E.A. Bokarev prelegis pri temo : « Kial venkis Esperanto ». Profesoro doktoro de geografiaj sciencoj D.L. Armand raportis en E. pri temo : « E. kaj scienco ».

Fine artisto de teatro de nomo Lenina Komsomolo N.N. Ritjkov tralegis multajn E-versaĵojn de Majakovskij kaj aliaj verkistoj.

La kunvenon ĉeestis pli ol 150 homoj, inter ili alilandaj gastoj kaj kelkaj plej malnovaj esperantistoj de la lando. Multaj konataj esp-istoj salutis la kunvenon per leteroj kaj telegramoj.

En urbo Ivanovo la kunveno memore al la Zamenhofa datreveno okazis en malgranda rondo de malnovaj geesp-istoj kaj kelkaj lernantoj de E.-kurso. Prelego pri « Doktoro Esperanto » okazis la 25.II.60.

« La verdan standardon tre alte ni tenas !
Ĝi signas la bonon kaj pacon ! »

Kun amikaj salutoj kaj bondeziroj — je nomo de E.-Sekcio de Ivanova Regiona Domo Instruista.

Sekretario N.I. ŜUMARIN.

(Eltiraĵo el « Pola Esperantisto »).

∴

SUR LA MALGRANDA EKRANO.

La Franca televido prezentis bonegajn bildojn pri la « Moulins des apprentis », kies iniciatoro estas S-ro C. Chareille, en Bonnat (Creuse). Interalie, la rigardantoj povis rimarki la belan dometon « ESPERANTO » kun la vorto « BONVENON » kaj la esperanta stelo. (17.7.60).

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO — WIEN.

Informas, ke la membroj kaj novaj aliĝantoj devas sendi siajn kotizojn al F-ino Jeanne DEDIEU, 70, avenue Victor Ségoffin, Toulouse. CCP Toulouse 28681.

PHILATELIE.

Nous remercions « Le Monde des Philatélistes » pour la place importante accordée aux feuilles d'album pour les timbres « Espéranto » — lors de son exposition de décembre 1960.

Nous rappelons que ces feuilles d'album peuvent être fournies par notre Centre National, 34, rue de Chabrol.

BRAJLA TAJPILO KUN ELEKTRONA CERBO, ELFARITA DE BLINDA PROFESORO k.a.

Blinduloj ricevas sian spiritan nutraĵon per brajlaj skribaĵoj, kiujn ordinare faras brajlaj kontribuantoj per manlabora servado. La kontribuantoj brajlskribas sur papero, truante punktojn per pinta ilo. Alia metodo de brajlo estas reliefa preso utiliganta zinkladon. Ambaŭ metodoj tamen estas maloportunaj, ĉar la unua necesigas multan tempon kaj la lasta multan koston.

S-ro I. Ozeki matematika profesoro de la liceo por blinduloj, apartenanta al Tokia Pedagogia Universitato, estante mem blindulo jam de frue klopodis elpensi pli efikan procedon por brajlo. Ankaŭ lia tezo por gradiga ekzameno en la universitato estis : « Analizo de brajlo laŭ la teorio de informado » kaj de ĉirkaŭ la fino de 1956 li ekpensis utiligon de teletajpilo por brajla skribado.

De tiu tempo li estis favorata por sia studo per kunhelpoj de S-roj H. Imai, asistanto en la pedagogia fako de la universitato, kaj Z. Kijasu, direktoro de la laboratorio por telekomunikaj esploroj en Telekomunika Laboratorio en Tokio, kun kiuj li konatiĝis pro sia gradiga tezo. Kaj ankaŭ S-ro S. Sekiguci, fakestro en la laboratorio por telekomunikaj esploroj, havis rilaton kun la studo kaj li plenumis desegnadon de praktika plano laŭ la elpenso de Ozeki.

Ilia kunlaboro sukcese progresis kaj ili povis kompletigi elektronan aparaton por aŭtomata brajlado, kiu konsistas el tri partoj, nome (1) latinlitera klavaro samspeca kun tiu de teletajpilo, (2) elektrona cerbo kiu havas 800 parametronojn, (3) brajla presilo. La aparato funkcias, kiam oni batas la klavojn, unue kiel teletajpilo, kaj donas bendon kun truoj al la dua brajla aparato kun elektrona cerbo, kiu faras apartan bendon kun brajlaj truoj. Laŭ la lasta bendo la tria brajla presilo presas ordinarajn brajlaĵojn.

S-ro Imai kaj aliaj klopodas plibonigi la aparaton kaj intencas fondi brajlan servocentron, kie ili instalos multekostajn partojn de la aparato nome elektronan cerbon kaj brajlan presilon. La fondaĵo celos servigi la aparaton por brajligo kaj ĝia presado el originalaj bendoj, kiuj estos senditaj per teletajpado de provincaj fondaĵoj.

La koncernatoj preparis publikigi la aparaton en la konferenco por la bono de tutmondaj blinduloj, kiun oni okazigis en Romo dum julio 1959.

Laŭ « *Orienta Revuo* », n° 8, 1959.

NEKROLOGO.

Forpasis Joseph ESTOUR, unu el niaj plej sinceraj pioniroj, forlasis nin. Li vivis en Solliès-Pont (Var), kie li senĉese propagandis kaj montris modelan vivon.

Li tradukis en nian lingvon diversajn librojn astronomiajn kaj filozofiajn. Li eldonis libreton en Esperanto pri hinda filozofo J. Krishnamurki.

Ni prezentas al lia edzino niajn sincerajn kondolencojn.

DOKTORO GIORGIO CANUTO

Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio mortis

La 29-an de oktobro subite mortis en Torino la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, D-ro Giorgio Canuto.

Li naskiĝis en Torino la 3-an de junio 1897 kaj fariĝis doktoro pri medicino kaj juro. Li profesis la jurmedicinon en Parma kaj poste en Torino.

En 1925, li interesiĝis pri esperanto kaj komencis sian agadon per instruado kaj prezidanteco de loka grupo. En 1928, li fariĝis Vicprezidanto de la Itala Federacio kaj poste Prezidanto.

Li gvidis esp. kurson en 1929 en la radio-stacio de Torino.

Mi havis la bonŝancon konatiĝi kun li okaze de la Pariza Kongreso en 1932. Jam de pluraj jaroj, la gvidantoj de SFPE laboris por la unuiĝo de la esperanto-movado. En tiu momento estis unuparte UEA kaj aliflanke la Konstanta Reprezentantaro de la Landaj Asocioj.

René Dubois, ĝenerala sekretario de la Pariza Grupo kaj reprezentanto de SFPE en KR verkis la unuajn regulojn por la unuiĝo.

En 1932, la Pariza Kongreso decidis elekti komisionon por prepari tian unuiĝon. Ĝin prezidis René Dubois, la aliaj membroj estis Schmazl (germano, kiu mortis) Ernfrid Malmgrem, svedo, poste, Prezidanto de UEA, Cecil Goldsmith, brito, poste, ĝenerala sekretario de UEA, kaj Canuto, italo. Kiel sekretario de la komitato, mi plurfoje korespondadis kun Canuto, kaj de tiu momento, komenciĝis inter ni bona amikeco, kvankam ni ne estis ĉiam samopiniaj.

La Kongreso en Kolonjo (1933) vidis la venkon de la ideoj de la Reorganiza Komitato, kaj Canuto fariĝis je tiu momento, ĝis la morto, komitatano de UEA.

En 1935, kun Inĝeniero Orengo, li havis la grandan meriton organizi la sukcesplenan universalan kongreson en Romo.

En 1956, dum la Universala Kongreso en Kopenhago, pro la eksiĝo de Malmgrem, D-ro Canuto estis elektita Prezidanto de U.E.A. — La Komitato renovigis sian postenon dum la Universala Kongreso en Varsovio (1959).

Bedaŭrinde la malsano ne permesis al li partopreni la Universalan Kongreson en Bruselo, sed li estis kun la francaj esperantistoj dum nia lasta nacia kongreso en Montélimar, kie li venis tutpersone por montri sian altan estimon al la laboro de la francaj esperantistoj. Kelkajn tagojn antaŭ la forpaso de nia Prezidanto, ni ankoraŭ interkorespondis pri la laboro efektivigebla ĉe la Eŭropa Konsilantaro.

Mi persone devas aldoni, kiel nuna Prezidanto de la Internacia Asocio de la Popoluniversitatoj, ke estas dank'al Prezidanto Canuto, ke la Popoluniversitato en Torino enkondukis Esperanton en siajn programojn. Esp. kurson verkis mem Prof. Canuto por la revuo de la Popoluniversitato en Torino.

Kiel prave skribas la Estraro de UEA en la informo pri la morto de nia Prezidanto, « la perdo de tiu ĉi « elstara personeco, eminenta sciencisto, integra espe- « rantisto kaj aminda homo signifas grandegan baton, « antaŭ ĉio por liaj edzino kaj filo kaj por la scienca « movado itala, sed ne malpli por la tutmonda Espe- « ranto-movado ».

P. PETIT.

UN COMPLOT...

Le Groupe de Bourg-la-Reine pour l'étude et la diffusion de l'espéranto a fêté le jeudi 27 octobre dernier le dixième anniversaire de sa fondation et le quatre-vingt quatrième anniversaire de la naissance de son président le Docteur G. Maillard.

La fête a été préparée en secret et c'est la veille que M. Henry Maillard invita son père à venir dîner comme s'il s'agissait d'un repas familial. « Mais je ne peux pas venir, répondit le Docteur Maillard, c'est le jour de la réunion du Groupe ». Il fut convenu que M. Henry Maillard préviendrait les intéressés et le Docteur Maillard se laissa convaincre d'abandonner pour une fois la réunion hebdomadaire.

Vers 20 h. un quart le Docteur Maillard, accompagné par son fils, arrivait à la porte du restaurant. A ce moment retentit une fantaisie sur « La Espero » de De Ménil, exécutée au grand orgue par M. Burg. On devine la surprise du Docteur Maillard quand il reconnut dans la salle une quarantaine de personnes qui l'attendaient et qu'il vit au milieu de la longue table un grand gâteau à la forme et aux couleurs du drapeau espérantiste, avec cette inscription « Gojan datrevenon » et 84 bougies multicolores. Visiblement le Docteur Maillard était très ému et après avoir serré la main à chacun, il prit place à une extémité de la table.

Au moment du dessert il fit brancher le micro et se préparait à parler, quand M. Muffang, secrétaire du groupe, lui dit : « Monsieur le Président, j'ai quelque chose à dire avant... ». — « Soit », répondit-il. Et M. Muffang prononça l'allocution suivante :

« Cher Docteur Maillard et cher Président,

Il y a dix ans, en octobre 1950, vous commenciez à accueillir chez vous, chaque semaine, le jeudi soir, quelques espérantistes de Bourg-la-Reine. C'était l'origine de notre groupe, qui, avec votre appui, sous votre sage présidence, n'a cessé de croître. Vous avez tenu à le doter de statuts qui garantissent sa neutralité et font qu'il est ouvert à tous ceux qui, pour des motifs divers, se servent de la langue internationale, ou veulent l'apprendre ou veulent la propager. Toujours à l'affût des moyens de faire connaître l'espéranto, vous avez pris toutes les dispositions pour une propagande efficace en multipliant les occasions de contact avec le public, qui, dans son ensemble, ignore l'existence de l'espéranto et des bienfaits qu'il peut apporter, par suite du silence à son sujet de la presse et de la radio dans notre pays. Ainsi vous avez organisé des dîners d'espérantistes pour permettre aux nouveaux adeptes de s'exercer à la conversation et aussi en vue d'exciter la curiosité de l'entourage et de montrer notre existence : vous vous souvenez de ces premiers dîners au Quartier Latin, puis à Bourg-la-Reine, et à Clamart. En mars 1952 un petit referendum parmi quelque deux cents habitants de Bourg-la-Reine pris au hasard montrait que 20 % seulement des personnes sollicitées de donner leur opinion sur la question de la langue internationale avaient pris la peine de répondre. Vous ne vous êtes pas découragé devant cette indifférence et le 15 juin de la même année vous aviez organisé une journée de l'espéranto à Bourg-la-Reine, avec examens pour les élèves, proclamation des résultats à la Mairie, en présence de M. le Docteur Mainguy, alors Maire de Bourg-la-Reine. Et la même année encore paraissait « Espéranto-Bourg-la-Reine », dont le premier numéro annonçait la conférence que vous avez faite ici même, le 8 mai, dans cette salle qui n'était pas alors aussi belle que maintenant, sur ce thème : « L'Espéranto, nouvel espoir du monde ». Et vous avez organisé bien d'autres soirées d'information, une fois en 1953 avec le concours de M. Pierre Petit, président de la Fédération Espérantiste de la Région Parisienne. Le Groupe comptait alors 29 adhérents. Une autre fois en 1956 avec le concours de M. Llech-Walter, Directeur de l'Association Polytechnique du Roussillon.

Pour présenter la preuve de l'efficacité de l'espéranto comme langue internationale vous avez à plusieurs reprises accueilli dans nos réunions des espérantistes étrangers : citons le Docteur Egami, professeur de chimie biologique à l'Université de Nagoya, au Japon ; Mme Datoe Toemenggoeng, de Djakarta, en Indonésie ; Mlle Lavermann, ingénieur en hydraulique, de La Haye en Hollande ; M. Oscar Koneczny, ce jeune scout allemand, qui faisait de l'auto-stop et que vous avez amené à Munich, lors du congrès universel dans cette ville, et qui depuis est venu vous voir ; le Docteur Shinoda, ce médecin japonais et célèbre chirurgien du cancer, que vous avez accompagné au cimetière de Sceaux, où il avait voulu se recueillir sur la tombe de Marie Curie ; M. Svica Shponar, étudiant yougoslave ; Mlle Jošiko Kajino, l'infatigable journaliste japonaise parcourant le monde entier, et il y a quelques jours un espérantiste allemand, M. Hoffmann.

Recherchant toujours les occasions de réunir les espérantistes vous avez aussi organisé des promenades ou des excursions, qui sont une détente et fournissent l'occasion de recruter de nouveaux adeptes parmi les invités. Nous nous souvenons des journées à Fontainebleau, à la Houssaye-en-Brie, à Barbizon, au Bois de Meudon, agrémentées par des concours et des jeux d'adresse animés par votre fils Henry.

Vous avez assuré à Bourg-la-Reine la préparation de deux congrès de la Fédération de la Région Parisienne, notamment du 34e Congrès le premier mai 1958.

Vous avez participé à de nombreux congrès espérantistes nationaux ou internationaux : au premier de tous, à celui de Boulogne-sur-Mer, en 1905. Cinqante ans après vous en avez évoqué le souvenir sur la place même de la gare, aujourd'hui place Zamenhof, où l'auteur de l'espéranto était descendu du train.

Vous avez dit qu'il faut conquérir la jeunesse à l'espéranto et vous avez institué des prix pour récompenser les jeunes qui ont fait le petit effort qu'il faut pour acquérir ce moyen d'intercompréhension universelle et qui n'ont pas perdu leur temps, puisque la connaissance de l'espéranto leur permet d'apprendre beaucoup plus vite et plus facilement des langues étrangères qui leur sont nécessaires pour leurs études ou leur profession.

Lorsque M. le Conseiller à la Cour, Hugo Steiner, a pris l'intitative d'élever à Vienne un monument à l'auteur de l'espéranto, vous avez applaudi et vous avez envoyé une généreuse souscription. Alors commençait à se réaliser la prédiction que vous aviez faite cinquante-trois ans auparavant.

Voilà, cher Docteur Maillard et cher Président, l'essentiel qu'il fallait rappeler de l'espérantiste que vous êtes, sans doute j'ai oublié beaucoup de choses, j'ai tenu à vous rendre un hommage au nom de tous les espérantistes qui vous connaissent, présents ou absents, qui s'associent à cet anniversaire et vous sont reconnaissants de tout ce que vous avez fait pour l'espéranto.

Mais nous savons aussi que ce dixième anniversaire

de la fondation du Groupe de Bourg-la-Reine est quatre-vingt quatrième de votre naissance dans la ville voisine de Sceaux et que toute votre vie vous vous êtes intéressé à tout ce qui peut améliorer le sort de l'humanité ou lui épargner des maux.

C'est pourquoi, sans doute, vous avez choisi la carrière médicale. Vous avez soutenu une thèse très remarquée sur la maladie de Parkinson et vous avez émis des idées qui étaient en avance pour l'époque et qui sont confirmées actuellement. Vous avez longuement étudié à la Salpêtrière, lorsqu'elle était encore tout imprégnée du souvenir de Charcot. Vous avez été nommé Chef de service à l'Hôpital de Bicêtre et vous vous êtes intéressé particulièrement à l'épilepsie. Le premier vous avez eu l'idée de traiter l'épilepsie par un barbiturique, c'est-à-dire par un dérivé de l'urée. Après des essais systématiques, vous vous êtes rendu compte que l'un d'eux, le Luminal, de fabrication allemande tenue secrète, diminuait considérablement le nombre des crises. Pour soulager vos malades vous avez voulu faire fabriquer le produit en France : les chimistes y sont parvenus. Mais quand il s'est agi de donner un nom à cette spécialité, vous n'avez pas voulu que votre nom y fut associé ; alors un chimiste qui assistait à la discussion, remarquant que les noms des autres barbituriques se terminent par « nal » (exemple véronal) dit « Il faut garder nal ». Et on a gardé nal (gardénal). Mais vous ne vous êtes pas reposé sur ce succès, vous avez continué vos observations et vos recherches, vous êtes arrivé à cette constatation que l'effet antiépileptique des médicaments était lié à la présence dans sa formule d'un radical « phényl », ce qui a conduit à préparer des antiépileptiques, contenant ce radical, mais qui ne sont plus les redoutables barbituriques.

Cette passion pour le bien, vous savez aussi la communiquer, comme, par exemple, à ce jeune scout allemand que vous avez rencontré sur une route près de Munich. Il ignorait tout de l'espéranto. Vous l'avez initié, il s'est enthousiasmé, vous avez reconnu ses qualités de cœur et d'esprit, il est devenu un ami. Il ne savait que faire, vous l'avez engagé à faire des études médicales. Il y a réussi. Vous pouvez, vous devez, cher Docteur Maillard et cher Président, être fier de ce succès.

Vous êtes aussi un pionnier de l'automobile et vous avez pris part aux deux premières courses d'automobiles. Lors d'une de ces promenades avec les espérantistes, aux environs de Saint-Germain-en-Laye, je crois, vous nous avez montré une petite pente, aux environs de votre ancienne demeure, que votre voiture d'alors était incapable de gravir, si bien que pour rentrer chez vous, le cheval-vapeur de votre moteur étant insuffisant, on devait vous amener régulièrement un cheval en chair et en os. Aussi l'un de vos oncles vous disait : « Comment peux-tu t'intéresser à des engins pareils, qui sont bruyants, sales, dangereux, tout le temps en panne, et qui marchent moins vite et moins bien que nos bonnes voitures à chevaux qui ont fait leurs preuves de tout temps ? Jamais cela ne prendra. On s'en lassera », vous répondiez que vous étiez certain que c'était le début de quelque chose qui se développerait et transformerait la vie de l'humanité.

Vous avez conduit avant que le permis de conduire ne soit institué et vous avez conduit presque quotidiennement pendant quarante-sept ans, sans un accident ni une contravention.

Dans l'aviation vous avez vu aussi une nouveauté pleine de promesses. Curieux de tout connaître vous avez volé avec Farmann.

Vous aimez toutes les activités de l'esprit et c'est pourquoi vous avez donné une grande impulsion aux cercles d'échecs que vous avez présidés à Paris et que vous présidez maintenant à Bourg-la-Reine.

Un des premiers à Sceaux vous avez eu le téléphone et l'on vous a fait cette objection : « A quoi bon cet appareil puisque tout le monde ne l'a pas ? ». Objection semblable à celle-ci : « A quoi bon l'espéranto, puisque tout le monde ne le parle pas ? ». A ces questions vous avez donné une réponse unique : vous avez donné l'exemple.

Et maintenant, cher Docteur Maillard et cher Président, permettez-moi de vous remettre ces souvenirs à l'occasion de ce double anniversaire, de la part de tous ceux qui vous aiment. »

A ce moment Mlle Saumade présente à M. Muffang les souvenirs qu'il remet au Docteur Maillard. C'étaient une marine, à l'aquarelle, une cuiller et une fourchette à gâteaux ou à fruits, ornées du portrait de Zamenhof.

M. Muffang et M. Jaegy communiquent au Docteur Maillard les vœux des personnes qui leur ont écrit qu'elles ne pouvaient venir mais s'associaient néanmoins à cette fête.

Encore plus ému, le Docteur Maillard répondit par l'allocution suivante :

Karaj gesamgrupanoj :

Enirante tiun ĉambregon, mi ne komprenis, kion mi vidis. Kion signifas tiu impona kunveno, pri kiu mi ne estas informita ? ... Sed baldaŭ mi ekkomprenis. Estas komploto, tuŝanta komploto, sekrete kaj lerte organizita. Nia Grupo estas nun dekjara kaj tiu ĉi vespero, la 27-a de oktobro, estas la datreveno de la naskiĝo de ĝia Prezidanto... Vi havis la kortuŝan penson asocii tiujn ambaŭ datrevenojn !... Mia emocio estas granda !... Pardonu, ke mi ne povas ordigi miajn pensojn... Tiom da memorajoj venas dum tiu momento en mian cerbon !

Tiom da jaroj elfluis ekde mia unua kontakto kun esperanto (oktobro 1892), kiam mi komencis studadi tute sola la lingvon per la unua lernolibro de « De Beaufront » kiu ĵus estis eldonita... Dek jarojn poste, mi starigis unu grupon en Sceaux (1902), kaj en 1905 kun ses el niaj kungrupanoj, mi ĉeestis la unuan esperantistan kongreson internacian... Je la nomo de mia grupo mi havis la honoron prezenti al Zamenhof nian respektplenan saluton.

Nun mi transsaltas super 45 jaroj por alveni al la tago en 1950, kiam S-ro Muffang vizitis min por interparoli pri eblecoj organizi unu grupon en Bourg-la-Reine. Mi petis iom da tempo por pripensi la aferon ĝis post la universala kongreso, kiu devis okazi en Parizo kaj mi konsentis doni mian plenan kunhelpadon. Do mi devas, hodiaŭ vespere dankegi S-ron Muffang, kiu konservis, prizorgis la sanktan flamon de Esperanto dum multaj jaroj kaj tiel ebligis la renaskiĝon kaj la ekfloradon de nia movado en Bourg-la-Reine, kiam la cirkonstancoj estiĝis favoraj. Kaj apud S-ro Muffang mi devas tute speciale mencii S-on Jaegy pro la grava kaj malfacila laboro, kiun li senĉese plenumas por nia movado malgraŭ siaj pezaj profesiaj kaj familiaj okupadoj. Nia kara Amiko montras imitindan ekzemplon : Sen S-ro Muffang kaj S-ro Jaegy nenio povus esti plenumita... Dank' al ili ambaŭ ni povas esti tie ĉi kuniĝitaj hodiaŭ vespere en tiu bela kortuŝanta festo : (longaj varmaj aplaŭdoj).

Mi elkore dankas ĉiujn niajn amikojn pro la necesega helpo, kiun ili alportas al ni kaj pro tiu simpatia etoso, kiu faciligas la progresadon de nia grupo. Kaj ankaŭ mi elvokas la memoron de niaj sindonemaj kungrupanoj forpasintaj dum ĉi tiuj dek jaroj : Profesoro Martzloff, Sinjorino Bourquin, Sinjoro Roche, Sinjoro Louis Bourreau, Doktoro Dauzats, pioniro kiu ĉeestis la kongreson de Boulogne !

Fine mi petas de ĉiuj kiel eble plej viglan helpadon, celante speciale enkondukon de esperanto en la lernejojn. Nur tiam homoj estos liberigitaj el tiuj pezaj miljaraj katenoj, la lingvaj baroj, kiuj apartigas ilin.

(Suite à la page 8).

ESPERANTO 1960

J'ai fait un rêve merveilleux !
Tous les hommes parlaient entre eux
La même langue, simple et belle !
La langue dite universelle !
Ah ! que chacun semblait heureux !
Heureux de se comprendre mieux !...

★

Pourquoi faut-il que ce beau rêve,
Comme tous les songes, s'achève !
Ce n'est pas un rêve insensé !
Il faut rompre avec le passé !
Si l'on veut s'aimer et s'entendre,
Il est grand temps de se comprendre !
Parlons la langue du progrès !
Et nous nous sentirons plus près...

★

En ce vaste monde où nous sommes,
Puissent nos frères, tous les hommes,
Apprendre ce latin vivant,
Clair et logique ! enrichissant !...
Langue de tous ceux « qui espèrent ! »...
L'espéranto ! verte lumière,
Surgissant soudain, magnifique,
Comme un flambeau de paix, d'espoir,
Dans les ténèbres linguistiques !...

★

Oui ! puissions-nous bientôt la voir,
Cette universelle lumière,
Baignant ainsi toute la terre,
Pour guider notre humanité
Sur le seul vrai chemin de la fraternité !...

Lille, Foire Commerciale, 3 avril 1960.

Guy AUGUEZ.

★

JOURNÉE DES NATIONS UNIES

Le 24 octobre a eu lieu, dans la salle de réception de l'Unesco, une manifestation organisée par le « *Comité Français des Organisations Non Gouvernementales pour la liaison et l'information de l'ONU* » — comité dont l'UEF est membre. Mr Rougetet, qui la représentait, a pris contact avec de nombreux autres représentants d'organisations à l'occasion de cette journée des Nations Unies.

Gabriel CHAVET

Unu el niaj plej eminentaj pioniroj kaj verkistoj, Gabriel Chavet, post kelkaj tagoj estos 80-jara. Mi ne volas, ke tiu dato pasu, sen diri al nia amiko, ke tiu datreveno estas por ĉiuj esperantistoj la rememoro de la servoj sennombraj, kiujn li faris al nia lingvo, al nia tutmonda movado, ekde tre longaj jaroj.

Ĉiuj scias, ke li fondis, en la liceo de Louhans, la unuan esperantistan grupon en Francujo; poste, ke li estis sekretario de la esperantista grupo de Paris, ke li organizis en 1914 la faman kongreson de Paris kaj la sekvantajn kongresojn, kaj ke li redaktis longe nian « Oficialan Gazeton ».

Sed mi ne povas eĉ resumi lian sekretarian laboron. Li prenis sur sin la tutan laboron de la Lingva Komitato kaj tiun tre gravan de la Centra Oficejo en Paris. Oni scias, ke li eldonis en 1908 la Principojn de Decimala Klasigo kun apliko al Esperanto, ke li starigis kun Privat la regulojn de la kontrakto de Helsinki, ke li fondis kun Warnier, en 1906, la Librejon de Esperanto; kaj oni vendas ankoraŭ plensukcese la faman lernolibron, kiun ili faris kune. Unuvorte, ke li partoprenis en la fondo de ĉiuj institucioj esperantistaj, kiujn ni konas nun. Li helpis ĉiumaniere niajn amikojn en Francujo kaj en la tuta mondo. Pro tio li estas kara al ĉiu el ni, kaj en la nomo de ĉiuj niaj samideanoj en la mondo, ni deziras al li longan vivon ankoraŭ, kaj dankante lin fervore pro la belega verko, kiun li jam plenumis, ni esperas, ke ni povos, dum fruktedonaj jaroj, profiti lian eksperimenton kaj riĉigi ĝin ĝis la definitiva triumfo de nia glora entrepreno.

Jean COUTEAUX.

UN COMPLOT...

(Suite de la page 7)

Kiel diris ofte nia japana amikino, Jos̆iko Kajino, « Esperanto estas rubando de amikeco, kiu ligas la spiritojn kaj la korojn de homoj » !

Mortu la lingvaj baroj !
Vivu Esperanto !
Kaj gloro, eterna gloro al Zamenhof.

De longs applaudissements saluèrent cette improvisation, mais stupeur, la salle est plongée subitement dans l'obscurité. Une panne ? Non, une vive lueur dans le fond de la salle : on apporte le gâteau avec ses quatre-vingt quatre bougies allumées, à la place du Docteur Maillard, qui, au milieu des applaudissements, doit s'y reprendre à sept fois pour les éteindre toutes.

Tandis que l'on dégustait le gâteau, dont chaque convive eut une grosse part, un vin pétillant était versé dans les coupes et l'on but à la santé du Docteur Maillard, à la prospérité du Groupe espérantiste de Bourg-la-Reine et au succès de l'espéranto.

MUFFANG.

IMPRESOJ PRI UNUA SPERTO DE UNIVERSALA KONGRESO

Mi estis petita konigi miajn impresojn pri la 45a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo. Ilin mi plezure surpaperigas. Tiel, mi havas la okazon danki la Marsejlan esperantan grupon, kiu subvenciis mian vojaĝon.

La brusela kongreso estas la unua, kiun mi ĉeestis. Tio vidiĝis kaj ankaŭ tion multe da partoprenantoj rimarkis. Kompreneble, mi ne konis la kutimojn, sed pluraj samideanoj bonvolis instrui min, por ke tuj de la komenco mi sentu min en amika rondo. Ĉi tiun afablecon mi retrovis dum la tuta kongresdaŭro. Sur la stratoj, en la aŭtobusoj kaj restoracioj, ĉiuj verdsteluloj ridetis kaj alparolis unuj la aliajn same, kiel se ili de longe sin konus kaj estus de ĉiam amikoj. Tio surprizis min, precipe dum la « interkona vespero », la malnovaj esperantistoj retroviĝis, interkisiĝadis, amike sin frapetadis la dorson.

Ĉi tiuj amikecmanifestacioj inter homoj de ĉiuj popoloj kulminis dum la solena inaŭguro kiam, post la paroladoj de la organizantoj, kiujn mi aŭskultis, kvankam, mi ne komprenis ĉiujn vortojn, delegitoj po unu el ĉiu lando venis bondeziri la Kongreson.

Tiu unua kunveno finiĝis per la esperanta himno « La Espero » ; la unuan fojon mi aŭdis ĝin kantata de tiel granda aro da homoj kaj kun tiom da konvinko, kredo. Tio estas pli kortuŝa, ol mi opiniis.

Ĉe kongreso la partoprenantoj ferias, do oni devas distri, plezurigi ilin. Pro tio sin sekvis :

Teatra Vespero, kies aktoroj perfekte ludis per la ĝusteco de siaj mienoj kaj tonvoĉoj ;

Internacia Balo, kie gejunuloj kaj ankaŭ gematuruloj vigle dancis laŭ la kutimo de sia lando ; mirigis min la maniero, laŭ kiu la viroj reakompanis siajn dancantinojn, kaj ankaŭ la miksado de modernaj kun folkloraj vestoj ;

Muzika Vespero, kiu plaĉis al ĉiu ĉar pianisto kaj soprano alternis kun esperanttradukitaj kantoj ;

Ekskurso al Bruĝo, kiun mi neniam forgesos. Matene ĉe la foriro el Bruselo oni donis bileton kaj sciigojn pri la vizitota urbo ; la trajno, al ni rezervita estis tre komforta,, ĝi posedis laŭtparolilon kaj la vojaĝo, komentariita, ŝajnis mallonga ; en Bruĝo ni vizitis la katedralon, la malnovan kvartalon, la kanalojn ; kompetentulo esperante klarigis al ni en la muzeo la flandrajn pentrajojn de la Primitivuloj ;

Akcepto en la Urbodomo de Bruĝo, kie ĉiuj partoprenantoj retroviĝis por la tagmanĝo. La tabloj staris en majesta, mezepoka kaj lignoplafona ĉambrego dekoraciita per multkoloraj flagoj ; la servistoj, vestitaj per lokaj kostumoj (kulotoj, ŝtrumpoj, kvastĉapeloj), estis lernintaj kelke da esperantaj vortoj kaj mi aprezis tiun afablajon ; tre gaja estis la manĝado kun muziko, la instrumentistoj, ankaŭ folklore kostumitaj, paŝis kaj repaŝis en la ĉambro, ne ĉesante ludi dum la tuta manĝotempo ; sed, kio pli ĝojigis min, estas la regalo, kiun ĉiuj invititoj ricevis por kunporti : bierglaso markita per verda stelo ; mi lokis ĝin sur la kamenbreton de mia hejmo, ĝi scivoligas miajn vizitantojn, kaj mi uzas la okazon por rakontadi al ili ĉi tiun ekskurson kiu finiĝis per la vizito de Ostendo.

Do ni ne havis tempon por enui, ĉar mi devas ankaŭ citi prelegojn pri beletraj, sciencaj kaj geografiaj temoj, gvidatajn vizitojn de banko, poŝtoficejo kaj muzeoj, ĝeneralajn aŭ fakajn kunvenojn rilate al la esperanta movado, oratoran kaj beletran konkursojn ; precipe mi spektis filmojn, ĉar la bildoj klarigas la tekston.

Fine mi rimarkis la bonan organizadon de la Kongreso. Al ĉiuj partoprenantoj oni donis libron, enhavantan ĉiujn necesajn klarigojn ; la programo estis tre preciza sed tiel vasta, ke nepre oni ne povis ĉeestis ĉiujn kunvenojn.

En la seminario por instruistinoj la dormoĉambro al mi rezervita estis tre komforta, sed mi ne havis tempon por ĝui ĝin, ĉar la partoprenado en tiu pasiiga kongreso estis tiel laciga, ke vespere mi pensis nur dormi.

Mi aldonas, ke la urbo Bruselo disponigis al la esperantistaro sian belegan palacon, kie la organizantoj povis arigi ĉiujn servofakojn.

Mi ege deziras retrovi en Harrogate ĉi tiun tiel simpatian kaj amikan etoson, kiun homoj el ĉiuj mondpartoj kreas dank'al Esperanto.

Renée TRIOLLE (Marseille).

COURS D'ESPÉRANTO ORGANISÉS EN 1960-61

Aix-en-Provence 7. Amiens 1. Angers 2. Arras 1. Aubenas 2. Auxerre 1. Avignon 1. Bar-le-Duc 1. Baugé 2. Besançon 1. Bourbourg 3. Bourges 2. Bourg-la-Reine 2. Calais 1. Caluire 2. Charleville 1. Chartres 1. Chaumont 1. Cluses 1. Cosne 3. Dijon 2. Epernay 2. Fécamp 2. Hénin-Liétard 2. Hyères 1. Le Havre 1. Le Mans 3. Les Andelys 2. Le Teil 1. La Rochelle 1. Lille 1. Luçon 2. Lyon 1. Maisons-Laffitte 1. Marseille 3. Migennes 1. Montélimar 1. Neussargues 1. Nice 1. Orange 1. Orléans 2. Paris 11. Perpignan 10. Romans 3. Royan 3. Saint-Avertin 1. Saint-Avold 1. Saint-Germain-en-Laye 1, Sancoins 2. Strasbourg 1. Tours 2. Valence 1. Versailles 2. Vire 2. — Sume 108.

N.B. — Ni petas la grupestrojn kontroli tiujn ĉi ciferojn kaj eventuale raporti al U.E.F.

NOVAJO !

PERKORESPONDA SUPERA KURSO

(preparado al la skribaj provoj de la Atesto pri Kapableco)
eldonita de la Esperantista Kulturdomo

Tiu kurso konsistas el :
10 tekstoj tradukotaj en Esperanton.
10 tekstoj tradukotaj en Francan Lingvon.
Gvidata studado de tri verkajoj.
Prezo de la kurso : 30 NF.
Prezo de la studlibroj :

Vivo de Zamenhof (Privat) :	5 NF.
Internacia Lingvo Lapenna) :	8 NF.
El la Maniko (R. Rossetti) :	10 NF.

(Tiu kurso estas rekomendita de la « Commission Scolaire » starigita de UEF kaj GEE).

Sendu enskribiĝojn al : Maison Culturelle Espérantiste, Château de Grésillon, Baugé (Maine-et-Loire) C.C.P. Nantes 1485-39.

UNE NOUVEAUTÉ !

COURS SUPÉRIEUR PAR CORRESPONDANCE

(pour la préparation aux épreuves écrites du Kapableco)
édité par la Maison Culturelle Espérantiste

Ce cours comprend : 10 versions et 10 thèmes gradués, une Etude dirigée de trois ouvrages.
Prix du cours : 30 NF.

Vivo de Zamenhof (Privat) :	5 NF.
Internacia Lingvo (Lapenna) :	8 NF.
El la Maniko (Rossetti) :	10 NF.

(Ce cours est recommandé par la Commission Scolaire instituée par UEF et GEE).

Adresser les inscriptions à : Maison Culturelle Espérantiste, Château de Grésillon, Baugé (Maine-et-Loire). C.C.P. Nantes 1485-39.

RÈGLEMENTATION DE L'ENSEIGNEMENT DE L'ESPÉRANTO

Proposée par la Commission Scolaire et approuvée par les Bureaux de l'Union Espérantiste Française et du Groupe des Éducateurs Espérantistes

Bénéficiant des circulaires officielles et de la bienveillance d'un nombre croissant de Chefs d'Etablissements, l'enseignement de l'espéranto a connu en France, au cours de l'année passée, une telle ampleur que la Commission Scolaire, formée de Membres de l'Union Espérantiste Française et du Groupe des Educateurs Espérantistes, a jugé opportun d'attirer l'attention des Professeurs d'Espéranto et des Présidents de Groupes sur l'organisation des cours dans les Etablissements d'Enseignement Public.

Les considérations ci-dessous n'ont pas pour but de gêner l'organisation des cours scolaires d'espéranto, mais bien au contraire, de mettre plus de cohésion dans l'action jusqu'ici toute personnelle des Professeurs et aussi d'éviter les conséquences regrettables de cours faits par des Professeurs improvisés dont le dévouement est supérieur à la compétence !

La Commission Scolaire, émanation des deux Associations précitées, soucieuse de la bonne marche des cours scolaires et de la qualité des résultats a fixé un certain nombre de conditions indispensables pour l'ouverture d'un Cours agréé d'espéranto dans un Etablissement public. Les Professeurs d'espéranto qui, sur un point quelconque, ne se conformeraient pas à cette réglementation ne seraient reconnus ni par la Commission Scolaire ni par les deux Associations dont elle émane et leurs cours devraient être considérés comme des initiatives privées ; en conséquence, la valeur des résultats obtenus et les incidents qui pourraient se produire au cours de l'année ne seraient nullement imputables au Mouvement Espérantiste Officiel.

Au contraire, en vue de la formation d'un corps professoral d'espéranto vraiment compétent, les Professeurs auront intérêt à adresser à la Commission Scolaire leurs réponse personnelle sur les divers points envisagés ci-dessous et à solliciter leur agrément. Les noms de ces Professeurs seront publiés dans les bulletins des deux Associations.

Art. 1er. — Tout Professeur devra posséder au moins l'Atesto pri Kapableco (Certificat de Capacité) ; à défaut, avoir enseigné l'espéranto dans un cours scolaire pendant cinq ans.

Art. 2. — Les espérantistes non titulaires de l'Atesto pri Kapableco pourront toutefois ouvrir un cours scolaire avec l'agrément de la Commission Scolaire, à condition :

a) de s'engager à passer l'Atesto pri Kapableco dans un délai de deux ans.

b) d'être déjà Membre de l'Enseignement Officiel (catégories EL ou ED).

c) d'être considéré comme professeur stagiaire.

Art. 3. — Les Professeurs sont répartis en trois catégories :

CAT. E.L. — Membres de l'Enseignement pour les « Langues Vivantes » et parfaitement au courant de cette pédagogie.

CAT. E.D. — Membres de l'Enseignement pour des disciplines autres que les « Langues Vivantes Etrangères » français, latin, physique, etc...

CAT. N.E. — Personnes n'appartenant pas à l'Enseignement officiel et ne possédant pas — en principe — de connaissances pédagogiques.

Art. 4. — Pour les trois catégories, l'âge limite pour solliciter l'agrément est fixé à 65 ans. Les professeurs en fonction lorsqu'ils atteindront cet âge pourront recevoir l'agrément jusqu'à 70 ans. Au-delà, leurs cours ne seront plus reconnus.

Art. 5. — Les Professeurs devront n'utiliser pour leurs cours, que des livres rigoureusement neutres au point de vue politique, confessionnel ou philosophique. A titre indicatif, voici une liste des manuels qui pourront être utilisés :

Esperanto por infanoj (U.E.A.).
Espéranto-Manuel (Chavet et Warnier).
Manuel d'Etude (Jean Couteaux).
La langue internationale (Baronnet).
Por la praktikantoj (Babin).
Ni parolu en Esperanto (Ribot).
Méthode Cseh (directe).
Privilegia Vojo (Setälä).
Sub la verda standardo (Korte).

Cette liste n'est pas limitative ; pour les autres livres d'étude et de lecture non mentionnés, les Professeurs devront les soumettre à la Commission Scolaire, en même temps que la demande d'agrément.

Art. 6. — Les abonnements aux journaux devront faire l'objet d'une attention toute particulière ; sont interdites par les règlements ministériels toutes publications à caractère confessionnel ou politique. Les Professeurs auront intérêt à se limiter aux journaux suivants :

Esperanto.
La Praktiko.
Heroldo de Esperanto.
Franca Esperantisto.
Esperanto & Culture.
Kulturaj Kajeroj.
Norda Prismo.
Nica Revuo.

Art. 7. — A la fin de l'année scolaire, les Professeurs devront faire passer à leurs élèves l'un des examens organisés par l'**Institut Français d'Espéranto.** Les résultats seront publiés dans les bulletins des deux Associations.

Art. 8. — Les Professeurs devront s'engager à entretenir les meilleures relations avec le Chef de l'Etablissement qui leur accorde la faveur de faire un cours. Ils devront en particulier, ne prendre aucune initiative, sans en avoir, au préalable, sollicité et reçu l'autorisation.

Art. 9. — Les Professeurs veilleront à ne pas gêner l'horaire de l'Etablissement par des retards dans le début ou à la fin de leurs cours.

Art. 10. — Ces cours ne doivent donner lieu à aucune rétribution de la part des familles. Il est donc strictement interdit de solliciter des élèves la moindre somme

(Suite à la page 11).

USONAJ IMPRESOJ

Lunĉo en familio

En Novjorko ĉe la Esperantista Klubo mi revidas kun plezuro diversajn konatulojn, inter ili viron kiu batalis en la Usona armeo por la liberigo de Francujo. Li tuj invitas min en sian hejmon por la sabata lunĉo kaj jen estas la reflekto de miaj impresoj.

Mi alvenas en modernan kvartalon kie estas pluraj 6-etaĝaj konstruaĵoj similaj al niaj francaj popolaj « H.L.M. ». — Mia afabla konatulo klarigas al mi, ke en lia domo loĝas 36 familioj. Nur ses el ili ne posedas aŭtomobilon. Li mem ne havas, kvankam li ricevas bonan salajron kiel gazetkompostito : 130 dolarojn (tio estas 650 N.F.) por semajno de 36 horoj. Por pliaj horoj la salajro estas 50 % pli alta.

La luprezo de lia hejmo, kiu konsistas el 4 ĉambroj, kuirejo kaj banĉambro, estas 90 dolaroj (tio estas 450 N.F.) monate, en kio ĉio estas enkalkulita : lumo, centra hejtado, varma akvo, elektra forto por la kuirado. Por la loĝantoj, la rezultato estas grava malŝparo de kiloŭatoj kaj varmo. Vintre, la hejtado estas ĉiam forta kaj la fenestroj restas pli aŭ malpli malfermitaj. Pro tio ankaŭ la vintraj vestaĵoj ne estas tre dikaj. La lampoj konstante estas lumigitaj.

Usono estas lando de riĉeco kaj abundo. Same, oni forĵetas manĝaĵojn. Kvankam ĉiuj posedas glaciŝrankon oni ĝenerale ne konservas restaĵojn, oni konsideras, ke ili estas malfreŝaj, kaj forĵetas ilin. Ankaŭ oni diras, ke la virinoj neniam riparas vestaĵojn aŭ ŝtrumpetojn, sed, kiam ili estas difektitaj, oni simple forĵetas ilin.

Post interŝango de ideoj, venas la momento de la lunĉo. Jen estas la menuo : unue, tre larĝa pampelmuso kun sukero. Poste venas la supo kun gusto de kokino kaj pizoj kaj fazeoloj. Kun la supo, kiel en Anglujo, ni ricevis panon sed poste la Usonanoj ne plu manĝas panon dum la manĝo. Fine, la mastrino servis dikan, orkoloran kokidaĵon kun terpomoj, pizoj kaj karotoj. Mi enketis pri la kuirado de la birdo kaj la edzino klarigis, ke oni unue metas ĝin en varman fritoleon kaj poste dum unu horo en la elektran fornon. Dum la manĝo ni trinkis akvon kun suko de nigra ribo.

La manĝmetodo hodiaŭ estas tre simpla : la du viroj ekmanĝas, la okjara filineto venas por telero da supo kaj reiras al la korto por senfine glitkuri sur radetoj. La 11-jara filo manĝas legomojn kaj eksidas sur tapiŝon en la salono por rigardi la televidan spektaklon. La edzino manĝas preskaŭ nenion kaj ofte iras al la kuirejo, kiu estas malgranda sed tre moderna.

Ni trankvile digestas post tiu bona manĝo kaj dekkvin minutojn poste venas sur la tablon vino, kafo kaj kukoj.

Vizitante la ĉambrojn mi konstatas, ke mia gastiganto havas tri « ĉevaletojn » : li kolektas poŝtmarkojn de ĉiuj landoj, li tre ŝatas muzikon, posedas multajn diskojn, kaj, pli idealiste, li okupiĝas pri Esperanto kaj uzas ĝin ofte por korespondi kun la tuta mondo.

Mi ne garantias, ke mi vizitis tipan amerikan familion, sed por mi estis tre simpatia speco.

J. Guillaume.

RÈGLEMENTATION DE L'ENSEIGNEMENT DE L'ESPÉRANTO

(Suite de la page 10)

d'argent, en dehors de celui qui est nécessaire à l'achat des livres et à l'abonnement aux journaux ; même dans ce cas, il y aura lieu de faire approuver ces dépenses par le Chef d'Etablissemnt.

Art. 11. — Les Professeurs devront s'abstenir, pendant leurs cours, de parler des tentatives linguistiques déjà faites dans le domaine de la compréhension internationale.

Art. 12. — Le port de l'insigne étant réglementé par des instructions officielles, les Professeurs devront, sur ce point, prendre l'avis du Chef d'Etablissement.

Art. 13. — La direction du cours d'espéranto revient exclusivement au Chef d'Etablissement où il a lieu, en dehors de toute ingérence du groupe espérantiste.

Art. 14. — A la fin de chaque année scolaire, les Professeurs devront adresser un bref rapport à la Commission Scolaire sur chacun de leurs cours et portant sur les résultats obtenus ainsi que sur les points qu'ils jugeront utile de signaler.

Art. 15. — L'agrément pourra toujours être retiré à un Professeur qui cesserait de se conformer aux prescriptions du présent règlement. Notification en sera donnée d'abord à l'intéressé en l'invitant à se mettre en règle, puis, au bout de trois mois, dans les revues des deux Associations.

DETAILS PRATIQUES

1) Toute demande d'agrément ainsi que toute correspondance destinée à la Commission Scolaire doit être adressée à M. RIBOT, 11, rue Paul-Vergnes, MARMANDE (Lot-et-Garonne), qui transmet aussitôt par voie de circulaire à ses collègues : MM. Bidoit, Clopeau, Jullien et Martin.

2) A partir de l'année 1961 (du 24 juillet au 7 août) la Maison Culturelle des Espérantistes organise un stage de Formation Pédagogique et de Préparation à l'Atesto pri Kapableco, avec possibilités de correction de devoirs écrits pendant l'année scolaire. Tous détails seront donnés prochainement dans les revues : Franca Esperantisto, Esperanto & Culture, Kulturaj Kajeroj.

Pour la Commission Scolaire,
A. RIBOT.

UNE ENQUÊTE SUR LA TECHNIQUE PIANISTIQUE MENÉE A TRAVERS LE MONDE GRACE A L'ESPÉRANTO

Ce n'est que par l'Espéranto, en ayant recours au service des délégués spécialisés de l'Association Espérantiste Universelle (organisme collaborant officiellement avec l'U.N.E.S.C.O.) qu'on peut réunir en peu de temps une riche documentation internationale sur une question d'intérêt général.

Pendant que l'enseignement du piano pourrait profiter d'une telle documentation, j'ai eu l'idée d'entreprendre une enquête mondiale sur la technique pianistique. Je suis heureux de porter aujourd'hui à la connaissance de mes collègues les résultats obtenus.

J'adresse tout d'abord ici mes chaleureux remerciements à tous ceux qui ont bien voulu mener cette enquête dans les sphères artistiques de leur pays. Je les prie de m'excuser si je ne peux les citer tous. Je me suis en effet adressé à une quinzaine d'espérantistes dans les pays suivants : Allemagne, Pays-Bas, Pologne, Tchécoslovaquie, U.S.A.

Je ne donne pas ici d'avis personnel, car il existe, pour enseigner le piano, plusieurs méthodes, toutes respectables, — fait sur lequel insiste le Professeur SMYKALSKI, de Wroclaw (Pologne) (1).

La pose de mains constituait un point important de l'enquête. On recommande le plus souvent celle du célèbre pianiste José ITURBI, dont les disques passent sur tous les émetteurs du monde, et aussi du grand pianiste-compositeur G.G. DAMASE (2). Pour illustrer ce fait, M. John PUTRAN, de New-York, et Mme Myrna POLLOCK, de Pacific Palisades (Californie) ont pris la peine de rechercher pour moi et m'ont envoyé le numéro du 9 septembre 1946, du magazine bien connu « *Life* », lequel comporte une photo grand format des mains d'ITURBI sur le clavier.

Une méthode très intéressante, portant le nom de méthode ROTH et illustrée de photos qui montrent la position des mains dans les différentes attaques du clavier, m'a été envoyée par le Professeur Hans SIFFRIN, de Stolberg (3).

En ce qui concerne l'expression « méthode allemande », quelquefois employée en France, les Professeurs VOGEL, de Cologne, et DAHLMAN, de Berlin, m'ont écrit qu'elle était inconnue parmi les pianistes de leur région. — Toutefois, le Professeur Fritz KAROW, de Cologne, qui a travaillé il y a vingt ans à Breslau avec le Professeur BRONISLAW Von POZNICK (mort en 1947) m'a écrit : « La méthode que vous nommez « allemande » est bien pratiquée au Conservatoire de Leipzig par le Professeur BREITHAUPT ».

Mme Marguerite LONG, en France, s'élève contre ce qu'elle appelle « le désir d'innover, un modernisme de mauvais aloi », semblant toujours d'accord avec ce qu'écrivait J. Ph. RAMEAU : « La faculté de marcher ou de courir vient de la souplesse du jarret; celle de toucher le clavecin dépend de la souplesse des doigts à leur racine ». (De la mécanique des doigts. — 1706).

Beaucoup de méthodes recommandent la main rapprochée du clavier. Un profane peut penser que, dans ce cas, il est difficile de passer le pouce. A ce sujet, Mme LONG écrit : «... en ce qui concerne le passage du pouce, le fond de ma pensée est qu'il ne faut pas s'en occuper » : C'est en effet sa conformation qui le fait passer.

Il me suffira pour terminer de préciser que je tiens volontier à la disposition des intéressés tous les documents reçus (correspondance, photos, méthodes). M'écrire à l'adresse suivante :

Robert BUERICK, Professeur de Musique, Délégué de l'U.E.A., 41, rue Gerschell, Calais (P.-de-C.).

(1) La R.T.F. a fait entendre l'été dernier l'ensemble folklorique polonais de WROCLAW sur Paris-Inter à l'occasion du 150e anniversaire de la naissance de CHOPIN.

(2) Parfaitement visible dans un programme de télévision, le 13 septembre 1960.

(3) En sa qualité de violoniste, le Professeur SIFFRIN me dit qu'en ce qui concerne l'enseignement du violon, c'est la méthode Karl FLESH qui est reconnue et qui se pratique dans sa région.

BANDE A PART

Le magnétophone connaît une vogue croissante dans les milieux les plus divers. C'est ainsi que le maire de Harrogate (Grande-Bretagne) utilise ce moyen original pour inviter, sous forme de « lettre sonore », les espérantistes au congrès international qui se tiendra dans sa ville en août 1961.

Si tous les gars du monde voulaient... donner de la voix !

(Nord-Matin).

Pour l'éducation pacifiste des enfants, le « Service Civil International » met en vente une série de 12 cartes postales différentes à colorier. « Les Enfants du Monde » (*indications en Espéranto*).

Ces cartes conviennent très bien pour chambre d'enfants ; décoration de classe ou récompense.

La série : 2,25 NF (frais de port compris).

5 séries : 10,75 NF (frais de port compris).

2 NF la série à partir de 10 séries (frais de port compris.

S'adresser à : *G. Perra*, 8, rue St-Charles, Lyon, 3e - CCP : Lyon, 765 85. Vente pendant les réunions de la Société Espérantise de Lyon, 2 NF la série.

GAZETARA SERVO (E. MOTILLON)

ARTICES REÇUS EN SEPTEMBRE

Le Courrier de l'UNESCO, de septembre publie deux lettres de lecteurs (un français et un anglais) relatives à l'Espéranto. L'une a pour conclusion : l'UNESCO nous montre la voie ; pourquoi ne pas adopter hardiment l'Espéranto ? La deuxième donne des renseignements sur les premiers timbres-poste espérantistes. Il s'agit de deux timbres émis en Russie en octobre 1925, en l'honneur du Dr A. S. POPOV, pionnier de la télégraphie sans fil.. Ces timbres portent les mots : « Inventisto de Radio, Popov ».

Institutions Mondiales (publié par les « Citoyens du Monde », nº de septembre-)octobre. — Information concernant les pièces de 1, 5 et 10 steloj émises par « Universala Ligo ».

Le Berry Républicain (Bourges) du 26-8. — Le Cher représenté au Congrès Universel d'Espéranto — avec cliché.

Le Journal du Centre (Nevers) du 19-9. — La Nièvre représentée au Congrès Universel d'Espéranto — avec cliché.

Paris-Normandie (Rouen) du 31-8. — Tourisme et Espéranto.

La Nouvelle République (Tours) du 20-9. — Cours d'Espéranto à Saint-Avertin.

Loisirs et Culture (bulletin du Comité d'Etablissement de la Régie Renault, au Mans. — Le Congrès de Bruxelles. La Vivo de nia Grupo.

Examens et Concours (mensuel édité par « l'Ecole Française », à Alger), nº de juillet. — Dans un article « En marge des jeux olympiques », M. Wintousky, professeur d'éducation physique au Lycée Gautier d'Alger, ancien champion de France de saut à la perche, raconte sa participation aux Jeux Olympiques de 1928, au Japon, et comment, grâce à l'Espéranto, il put entrer en relations avec son adversaire japonais, Mishida, dont il fut d'ailleurs vainqueur.

Dans cette même revue, très répandue dans les milieux étudiants en Algérie et en France, paraît un excellent cours d'Espéranto, rédigé par M. Louis FOURCADE.

A Vienne (Isère), les journaux locaux publient régulièrement — plusieurs fois par mois, — des informations concernant l'activité du Groupe Espérantiste.

ARTIKOLOJ RICEVITAJ DUM OKTOBRO

La République du Centre (Orléans), 6-9. — Un espérantiste orléanais en voyage dans les Balkans.

La Nouvelle République (Tours), 4-10. — Les activités culturelles du Groupe espérantiste.

Le Journal du Centre (Nevers), 17-10. — L'Association Espérantiste Cosnoise a tenu son Assemblée générale.

L'Indépendant (Perpignan), 18-10. — Une Monnaie Internationale.

Le Courrier de l'Ouest (Angers), 23-9. — Le « Cercle Espéranto ». — 22-9. — La valeur humaine et culturelle de la langue internationale. — Dans le cours du mois d'octobre, 7 articles : Un réseau mondial d'amitié. — Une exposition « Espéranto et Philatélie (2 articles). — Ouverture des cours d'espéranto. — Voyage en Scandinavie. — Les activités du Cercle « Espéranto ». — Emissions de la « Voix de l'Amérique ».

La France (Bordeaux), 11-8. — Le Congrès universel d'Espéranto.

Sud-Ouest (Bordeaux). — Dans la période du 20-7 au 31-10, a publié 12 informations concernant la langue internationale, dont 2 accompagnées de clichés.



Coupure de **« Le Facteur X »**, Revue Mensuelle de Variétés Scientifiques, nº 65, nov. 60.

(Editions du Levier, 15, rue du Louvre, Paris-1er).

Revue diffusée parmi les professeurs scientifiques et les élèves du second degré.

Réponse du Rédacteur en Chef à M. R. Moureaux, Lons-le-Saunier. — Je ne suis pas du tout emballé pour l'Ido, non plus que pour l'Espéranto dont un de nos premiers abonnés, M. François, d'Orly, voulait aussi faire un sujet d'étude. Cela vous paraît contradictoire avec les articles de R. G. d'H., propos linguistiques de haute classe, qui sont un honneur pour le **Facteur X** à notre avis, n'en déplaise à certains qui n'en voient pas la valeur en une revue scientifique ! Il m'est arrivé cependant, il y a un an, de perdre le fruit de trois mois de travail pour avoir mal compris une phrase pourtant correcte : j'avais mis l'accent sur un mot alors que pour l'auteur de la phrase l'accent dominant était sur un autre et les sens résultants étaient très différents ! Il y a tellement de sous-entendus dans chaque phrase, tellement de prolongements inexprimés qui devraient en achever la signification, qu'à part la banalité quotidienne logique ou simplement raisonnable et rationnelle, il est à peu près impossible de dire vraiment ce qu'on pense, même en de nombreuses phrases. Et vous voudriez une langue internationale ! Quant à faire connaître **Facteur X** à l'étranger et répandre nos idées, je ne demande pas mieux, mais qu'on m'aide. Chargez-vous des relations avec ce professeur russe, comme M. Ehrard le fait avec le professeur Denk, nous vous donnerons toutes facilités. Envoyez-nous son adresse, nous lui enverrons des spécimens. Il en est déjà parti pas mal en bien des pays et dont les articles ont été traduits dans la langue mais nous sommes beaucoup plus souvent copiés, transposés, adaptés, que vraiment traduits avec références. Cela n'a d'ailleurs aucune importance et nous n'en faisons pas grief à ceux qui sont à court de connaissances ou d'expériences. Cela se passe en France même où nos propres articles sont parfois à peine démarqués. L'important est que nos idées ne soient pas déformées, et je crains que l'Ido ne soit pas plus efficace pour cela que notre bonne vieille langue maternelle dont tous les mots sont si chargés de sens. D'ailleurs, j'ai l'impression de n'avoir pas bonne conscience en vous répondant ainsi. Je laisse la question en suspens et la pose ainsi à tous nos lecteurs. J'accepte à l'avance toute discussion et publierai votre article, mais envoyez-moi votre énoncé de problème en Ido avec sa traduction et quelques considérations élémentaires sur les structures de cette langue. Merci, très amicalement.

N. de la R.: Une question en suspens !...

"VIVO DE LA GRUPOJ KAJ FEDERACIOJ"

La Redakcio akceptas nur tajpitajn tekstojn en korekta Esperanto. Ni povas aperigi nur presklišojn, NE simplajn fotojn.

ALĜERI-SAHARA FEDERACIO.

Ni ne povas prezenti gravajn sukcesojn al niaj samideanoj. La situacio en nia regiono forte ĝenas la publikan agadon. Nuntempe la eblecoj estas malmultaj : informado de buŝo al orelo ; informado pere de la gazetoj. Bedaŭrinde la rezultoj estas malgravaj.

Tamen la federacio iom post iom progresas. Ĝi nombras 40 membrojn, inter ili 18 novaj.

Tiun rezulton oni grandparte ŝuldas al S-ro Micoud, kiu en la malgranda Nemours sukcesis interesi siajn samurbanojn pri Esperanto.

La Alĝeranoj regule kunvenis la lastajn monatojn. Ĝis nun, dum tiuj kunvenoj, oni nur « babilis », ĉar la plimulto de la ĉeestantoj ne plu havis okazon paroli de kelkaj jaroj.

Jen esperdonaj faktoj. Ni daŭrigos la agadon.



ANGERS.

La 20-an de oktobro, okazis la inaŭgura vespero de la Esperanto-kursoj, gvidataj ĉiusemajne de S-ro Audoin, en la ĉambrego de la municipaj kursoj.

Novaj kaj malnovaj geesperantistoj, post mallonga prova kurso kaj paroladeto, povis admiri belajn kolorbildojn pri Svedujo kaj Finnlando, faritaj dum kongresoj de fervojistaj esperantistoj, de F-ino Lemonnier, nacia prezidantino de tiu fako.

Dum la antaŭa semajno, en la halo de la turisma oficejo, la grupo estis prezentanta ekspozicion titolitan « Espéranto et Philatélie », kies materialon sendis al ni S-ro Jack Rousseau, de Parizo.

La ekspozicio estis vidita, interalie, de la filatelistoj de Angers, kiuj kunvenas en tiu loko.

Dudeko da personoj enskribiĝis por nia unuagrada publika kurso.

Aliflanke, S-ino Cheverry gvidas kurson por knabinoj de metilernejo kaj S-ro Marchand, teknika Direktoro en kolegio, instruas esperanton al sufiĉe multaj gejunuloj.

Dua-grada kurso funkcias ĉe S-ino Potin.

Post la sukceso de la kulturaj vesperoj « Uzbekistano » kaj « Unu Tago en Pekino », kiu komencis serion pri la orientaj popoloj (en konformiteco kun la nuna agado de UNESKO), okazis plensukcese, la 21-an de novembro, vespero pri la Ciganoj (« Tziganes et Gitans »).

Por prepari tiun vesperon, ni rilatiĝis antaŭe kun esperantistoj de Centra Eŭropo kaj kun la Pariza Asocio de la ciganaj studoj.

La programo entenis :

— tekstojn legitajn en esperanto de deko da kamaradoj ;
— prezentadon de du franclingvaj mallongaj filmoj ;
— aŭskultadon de diskoj de Cigana muziko ;
— prezentadon de fota ekspozicio en la ĉambrego.

Tiaj vesperoj multe interesas niajn membrojn.

Nia Grupo oficiale aliĝis al la « Fédération des Clubs UNESCO » (23 Strato Lapérouse, Paris), kiu regule sendas al ni interesan kaj utilan dokumentaron ĉiuspecan.

Eĥoj de la Internacia Antaŭralio de KAMPADO kaj Loĝveturilado en Dijon fine de julio.

120 Karavanoj retroviĝis en Dijon por tie travivi la belajn tagojn, kiujn alloga programo rezervis al la partoprenantoj. Iliaj esperoj estis larĝe kontentigitaj. Gastronomio, turismo estis je la honoro por konfirmi la justan reputacion de la gastama Burgundujo.

Se la francaj loĝveturilantoj estis plej nombraj, ni tamen indiku, ke Anglujo, Belgujo, Luksemburgio, Danujo, Svisujo, Italujo estis reprezentitaj kaj ni bedaŭru, ke la esperantistoj « sin anoncintaj » ne estis pli multaj. La Dijona Esperantista Grupo tamen ĉeestis : ĉeestis per la universala emblemo, kiu apudestis la naciajn flagojn, ĉeestis dum la programo, ĉeestis per verda stelhava anonctabuleto, kiu konstante informis la esperantistojn, ĉeestis per la alvokoj, kiujn ĝi sendis al ĉiuj kampadistoj je la nomo de la Interrilata Centro Internacia de la esperantistaj kampadistoj.

Kiel bela, vere internacia kaj familia estus estinta tia renkontiĝo, se ĉiuj estus parolintaj en Esperanto.

Ni semu, kaj semu, por ke finfine la lingvobaroj iam malaperu el la ralioj.

ĜEMELIĜO DE LA URBOJ FRANKFURT AM MAIN KAJ LYON.

De la 8-a ĝis la 15-a de oktobro okazis en Frankfurt-am-Main la german-franca semajno, dum kiu la urboj Lyon kaj Frankfurt ĝemeliĝis. La Esperanto-grupoj de la du urboj decidis partopreni en la starigo de amikaj rilatoj inter la du urboj. Reprezentantoj de la du grupoj kunvenis dum la U.K. en Bruselo kaj unuanime akceptis tie rezolucion, per kiu ili montras sian pretecon kunhelpi ĉe la realigo de la ĝemeliĝo. La rezolucio konsistis el du originaloj esperantlingvaj : unu por ĉiu urbo ; tradukoj franca kaj germana estis aldonitaj. La teksto de la rezolucio estas la jena :

Pro la fakto, ke la urboj Lyon kaj Frankfurt-am-Main ĝemeliĝas, la oficialaj delegitoj de la Esperanto-societoj de Lyon kaj Frankfurt-am-Main decidis komune kunveni okaze de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo. Ĉiuj delegitoj de ambaŭ urboj

— tio estas 36 personoj — unuanime voĉdonis la sekvantan rezolucion, kiu estos oficiale prezentita al ambaŭ urbestroj pere de komisiono elektita tiucele.

REZOLUCIO.

La Esperanto-societoj de Lyon kaj Frankfurt-am-Main estos je la dispono de la urbestroj de la koncernaj urboj por alporti al ili sian plej grandan helpon en la intenco faciligi ĉiumaniere la realigon de la ĝemeliĝo. En tiu senco ŝajnas oportune, ke la du urboj organizu kursojn por rekta interkorespondado inter la loĝantoj de la du urboj kaj konsekvence al tiuj kursoj entreprenu kulturvojaĝojn de unu urbo al la alia, preparu ekspoziciojn kaj ankaŭ se eble eldonu komunan oficialan bultenon, kiu povus aperi en la oficialaj lingvoj germana kaj franca kaj en la internacia lingvo Esperanto.

Bruselo, la 2-an de aŭgusto 1960.

por la Société Espérantiste de Lyon, s. Perra.
por la Esperanto-Gesellschaft Frankfurt-am-Main e.V., s. Selten.

Krome la du grupoj konsentis ekstarigi amikajn interrilatojn, interŝanĝi informojn pri siaj urboj kaj intergrupajn komunikaĵojn, peri korespondadon inter la membroj de la du grupoj, ktp.

Frankfurt-am-Main.

Bedaŭrinde la grupo frankfurta ankoraŭ ne povas raporti multe. Ĝi klopodis transdoni la rezolucion rekte al la ĉefurbestro, sed pro preparaj laboroj je la german-franca semajno kaj la ĵus okazintaj komunumo-elektoj li tute ne havis tempon. Finfine oni interkonsentis kun urbestrarano, la ĉefo de la oficejo por scienco, arto kaj popoledukado, ke oni sendos al li la rezolucion kaj priparolu kun li la proponojn faritajn en ĝi post la ĝemeliĝo-aranĝoj. La ĉefaj gazetoj de Frankfurt estis informitaj pri la transsendo kaj la enhavo de la rezolucio. Du el ili favore priparolis tiun okazaĵon.

Lyon.

La 20-an de oktobro, Sinjoro Louis Pradel, urbestro de Lyon, akceptis delegacion de la Liona Esperantista Societo, kiu portis al li la supre indikitan peticion. Bona akcepto. Sinjoro Pradel diris, ke plurfoje dum sia politika vivo li sentis la neceson de komuna lingvo, ke li aprobas Esperanton kaj ke li deziras ke ĝi estu devige instruata en la elementaj lernejoj de ĉiuj landoj. Plie, li aldonis, ke li estas preta helpi nin laŭ sia povo. La tri ĉefaj ĵurnaloj de Lyon recenzis pri tiu evento, pli malpli longe sed ĉiam favore, kaj presis fotojn.

NORD-FRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

AMIENS.

La jara kongreso de la Nord-Franca Esperanto-Federacio okazos en Amiens la 4-an de junio 1961. Ekde nun preparu vian ĉeeston !

ROUBAIX.

S-ro Raymond Legrand sukcese trapasis en Montélimar la superan ateston pri lernado. Niajn gratulojn.

ROUBAIX-TOURCOING.

La loka rondo daŭre kunlaboras kun « Lille-Espéranto », la Nord-Franca Federacio kaj la regiona gazetaro. En 1961, la sekcio invitos plurajn eksterlandajn gastojn. Krome, la klubo regule disdonas esperantlingvajn faldfoliojn al la anoj, kiuj petas ilin. Novajn eldonaĵojn (minimume 5 ekz.), bonvolu sendi tiucele al L. Giloteaux, sekretario, 7, rue Saint-Saëns, Wattrelos (Nord). Antaŭdankon.

NORMANDA FEDERACIO

AUMALE (Seine-Maritime).

Grava Inform-Vespero organizita de nia Samideano Truffart, apotekisto, kaj publika pedagogia parolado de S-ro Marcel Bosc, honorprezidanto de la Normandaj Esperantistoj antaŭ 200 Ge-anoj de Publika Instruado.

En bele ornamita Festĉambro ap'aŭdigis la kreadon de D-ro Zamenhof ĉeestantoj, veturintaj de pli ol 40 kilometroj.

La Parolado havis tri partojn : la deveno de la lingvoj, la Babelturo, kaj la solvo : t.e. ESPERANTO.

ROUEN (Seine-Maritime).

« Esperanto-Turisma-Servo » (Dir. S-ro Bosc) decidis vizitigi NORMANDION al Turistoj per ESPERANTO ekde la printempo. La normandaj urboj estas pretaj akcepti, gvidi la venontojn. Jam « Esperanto-Turisma-Servo » sendis 1.000 invitojn al eŭropaj esp-Grupoj kaj UEA-delegitoj.



PARIZA ESPERANTO-GRUPO : Sorbona kunveno (4 novembro 1960).

Rekomenciĝis la ĉiumonataj kunvenoj en la Geologia Amfiteatro. Vendrede vespere, je la 21-a horo, la Vic-Prezidanto, S-ro Henri Dabezies, malfermis la seancon, anoncante la programon kaj atentigante pri la terura altiĝo de la luprezo. Tuj poste li transdonis la parolon al S-ro Paul Ciliga, Komitatano de la Grupo, kiu resumis prelegon faritan la 23-an de julio en la Esperantista Kulturdomo Grésillon pri « Estonta evolucio de l'Esperanta Vortfarado per Kvazaŭafiksoj (pasivaj analiziloj kaj aktivaj deriviloj) ». Tiam, ĝuste ĉe la fino de ĉi tiu skizo, alvenis el Epernay (Marne) S-ro Serge Debar, Sekretario l' tiea grupo; li projekciis tre belajn kolorfilmojn pri fervojistaj aranĝoj ĉi-jaraj ; vojaĝo tra Danlando (Kopenhago) kaj Svedlando (Stokholmo) al la Internacia Kongreso en Helsinki (Finnlando) ; plie vidaĵoj pri Nederlandaj floroj, franca fervojista kongreso en Rouen kaj renkontiĝo (kun ludoj) en la Kastelo Grésillon, kies elegantan formon kaj gajan etoson tiele povis ekkoni la ĉeestantoj, kiuj ankoraŭ ne havis la plezuron viziti la nepre konendan Kulturdomon.

J. G.



EN LA KADRO DE LA ESPERANTISTA PEDAGOGIA SEMAJNO, TRI GESAMIDEANOJ DE PERPIGNAN RICEVAS LA ORDENON DE LA NACIA MERITO PRO SIA ESPERANTISTA AKTIVECO.

Sub la aŭspicio de la Ministerio de Edukado okazis en Perpignan de la 8-a ĝis la 15-a de decembro la Esperantista Pedagogia Semajno, organizita de la Esperanto-Klubo de Perpignan. La celo de tiu ĉi renkontiĝo estis kapabligi estontajn instruistojn de Esperanto.

La laborkunsidoj komencis la 8-an de decembro en Lernejo Racine, per prelego de S-ro René Llech-Walter, Prezidanto de U.E.F.

Vendredon, la 9-an de decembro, en la sidejo de la Kultura Centro, okazis prelego de S-ro André Ribot pri la temo « Historio de la lingvo Esperanto ».

Sabaton, la 10-an de decembro, okazis solena festo en Lernejo Racine kun ĉeesto de urbaj aŭtoritatoj. I.a. ni menciu la nomojn de Pastro Bizebars, reprezentanto de la episkopo de Perpignan; S-ro Cazes, departementa Direktoro de Poŝto kaj Telekomunikoj; S-ro Charles Grando, reprezentanto de la klerigaj societoj; S-ro Lourmand, Delegito de la Franca Nacia Merito kaj advokato; S-ro Rocaries, Prezidanto de la Politeknika Asocio.

S-ro Llech-Walter malfermis la solenan kunsidon, klarigante la celojn de la Internacia Lingvo kaj la rezultojn, kiujn ĝi atingis.

S-ro Grando substrekis la meritojn de nia sindona prezidanto. Li reliefigis, ke S-ro Llech-Walter estas, krom esperantisto tutmonde konata, ankaŭ aktiva kunlaboranto de pluraj kulturaj institucioj de Roussillon.

Post sia parolado S-ro Grando transdonis solene la kavalirajn krucojn de la Nacia Merito al F-ino Anna Vidal kaj al S-ro Robert Gendre pro la servoj faritaj por la instruado de Esperanto, kaj la krucon de oficiro de la Nacia Merito al nia Prezidanto S-ro Llech-Walter, pro la servoj faritaj por la disvastigo de Esperanto en la lokan, regionan kaj nacian mediojn.

S-ro Grando transdonis ankaŭ la diplomojn de la *Franca Instituto de Esperanto* al la gelernantoj, kiuj sukcese trapasis la ekzamenojn en diversaj lernejoj de Perpignan, kie okazas devigaj kursoj de nia lingvo en du porinstruistaj lernejoj (Ecole Normale de Jeunes Filles kaj Ecole Normale de Garçons), kaj nedevigaj en aliaj lernejoj.

La ĉeestantoj estis regalitaj per honora vino, kaj ili vizitis poste la allogan Esperanto-Ekspozicion. Tie estis montritaj interalie la altiraj paneloj pretigitaj de S-ro Lentaigne, de Montpellier, kies enhavon klarigis li mem.

Finfine la solena kunsido estis fermita per du paroladoj de S-ro Robert Gendre kaj de S-ro Dario Rodriguez Lopez de Silva, de Madrid.

Dimanĉon la 11-an de decembro prelegis S-ro Llech-Walter pri la temo « Utileco de korekta prononco ĉe la Esperanto-instruistoj », kaj S-ro Gendre pri « Esperanto kiel fonto neelĉerpebla de intelektaj profitoj ».

Lundon la 12-an de decembro okazis prelego de S-ro Rodriguez pri « La rekta metodo en la Esperanto-instruado ».

Mardon la 13-an de decembro, S-ro Llech-Walter faris paroladon pri la temo « Kiel aranĝi Esperanto-kurson por junaj komencantoj ».

Merkredon la 14-an de decembro okazis praktikaj ekzercoj sub la gvido de F-ino Anna Vidal kaj S-ro Llech-Walter pri la temo « La magnetofono, valora isntrumento por la Esperanto-instruado.

Ĵaŭdon la 15-an de decembro, datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, post prelego de S-ro Rodriguez pri « La vivo de D-ro Zamenhof », nia Prezidanto S-ro Llech-Walter solene fermis la sukcesan kaj multe ĉeestatan serion da laborkunsidoj.

La Esperantista Pedagogia Semajno estis tre fruktodona ankaŭ laŭ propaganda vidpunkto, ĉar la lokaj gazetaro kaj radio favore kaj abunde sin okupis pri la aranĝoj, kiuj bonege sukcesis dank' al la lerta gvidado de nia aktiva Prezidanto S-ro Llech-Walter.

Perpignan, le 12 décembre 1960.

Le Chef du Service Départemental
de la Jeunesse et des Sports
à
Monsieur le Président
du Cercle Culturel Espérantiste,
Perpignan.

Mon Cher Président,

Un événement fortuit et très fâcheux m'a empêché d'assiter au début de votre semaine pédagogique.

Une réunion administrative à Paris, m'oblige maintenant à m'absenter pendant quelques jours; ainsi, il me sera impossible de participer, comme je l'aurais voulu, à une partie de vos travaux.

Je vous en exprime mes regrets.

Je vous demande de bien vouloir apporter aux conféciers, et aux auditeurs, mon salut personnel et celui du Haut-Commissariat à la Jeunesse et aux Sports.

Je souhaite que tous sachent l'intérêt que porte mon Administration à de tels stages culturels, et la part qu'elle prend de leur organisation.

Comptant sur vous pour expliquer mon absence, je vous prie de croire, mon Cher Président, à l'expression de mes sentiments les meilleurs.

Le Chef du Service départemental
de la Jeunesse et des Sports,
P. GERVAIS.

PRIVAS.

En la porinstruista lernejo okazis la 17-an de novembro prelego antaŭ 200 estontaj geinstruistoj kaj S-ro Blériot, direktoro.

S-ro R. Levin, prezidanto de la Esperanto-societo de Liono, tre lerte parolis pri la problemo de internacia lingvo kaj ege sukcesis interesigi siajn geaŭskultantojn.

Sekvis debato kun partopreno de la direktoro kaj prezentado de fotoj, faritaj eksterlande de S-ro Blanc el Vals-les-Bains.

Konsekvence malfermiĝis 2 kursoj en la porinstruistaj lernejoj de Privas, — kursoj gvidataj de S-ino P. Bascou kun ĉ. 50 gelernantoj.

VIENNE (Isère).

Kiel anoncite, la « SYNDICAT d'INITIATIVE » en VIENNE eldonis esperantlingvajn faldfoliojn, entute 50.000 ekzemplerojn en du eldonoj. Ĝis nun proksimume 35.000 el ili estis jam dissenditaj de li pere de la adresaro de la Jarlibro.

FILMOPREZENTO

Enscenigo. — Kenji Mizoguŝi.

Scenaro. — Yoŝitaka Yoda el la romano de Saikaku Ibava : « Koŝoku Iŝaidi onna » Amora vivo de virino.

Foto. — Yoŝimi Hirano. — *Muziko :* Iŝiro Saito. — *Dekoracio :* Hiroŝe Mizutani.

Aktoroj. — Kinujo Tanaka (O'Haru), Iŝiro Sugaj, Masao Ŝimicu, Toŝiro Mifune, Cukie Matsuura, Eirato Ŝindo, Jutaŝi Uno.

Produktisto. — Ŝintoho 1951. — *Disdonisto :* O.C.I. — *Daŭro :* 1 h. 58.

Scenaro. — O'Haru, filino de Samurajo, amas Katsunosuke'n, kies socia rango estas malpli alta ol ŝia. La amantoj estas malkovritaj. Li estas senkapigita. Ŝi estas forigita en ekzilon kun sia familio, kiun ŝi kuntiras al dekadenco. Tiamaniere komenciĝas la longaj malfeliĉoj de O'Haru.

Ŝi estas vendita de sia patro, feliĉe, al nobelulo, al kiu ŝi donacas filon. La dankemo de la nobulelo al la konkubino malplaĉas al la leĝa edzino : O'Haru estas forpelita.

Vendita kiel diboĉistino, ŝi momente sukcesos eliĝi el sia situacio nur por poste pli profunden refali. Ŝi laboras ĉe komercisto sed lia edzino maldungas ŝin. Ŝi edziniĝas sed ŝia edzo estas mortigita per rabistoj. Ŝi provas mem eniri en monaĥejon sed, kiam ŝia kondiĉo de diboĉistino estas malkovrita, ŝi estas ankoraŭ forpelita. Fariĝintan maljuna, ŝia filo ŝin venigas. Kiam ŝi ekkomprenas, ke ŝi neniam povos alproksimiĝi de li, ŝi forkuras. O'Haru finos sian vivon almozpetante proksime de kelka « infera pordo ».

La *Aŭtoro,* Mizoguŝi naskiĝis en 1898. Li estas kinoprofesiulo jam de 1920. Li estas kun Kurosawa la plej konata en Eŭropo el la japanaj filmistoj.

Inter liaj filmoj oni citas : « Fratinoj de Ĝjon » (Ĝjon no kjodaj) 1936 — « Elegio de Naniva » (Naniva Ereju) 1936 — « Vivo de O'Haru » (Sajkaku iŝidaj onna 1952) — « Kontoj ĉe malpreciza luno » (Ugetsu Monogatari 1953) — « Intendanto sanŝo » (sanŝo Daju 1954) — « Krucumigitaj amantoj » (ŝikamatsu Monogatari 1954) — « Princino Sen » 1956. Imperiestrino Jang kŭaj Fej.

Filmfarado.

A) *Konstruado.* La plej granda parto estas rakontita sub formo de reveno al pasinteco. La maljuna (diboĉistino) prostituino, kiu ne plu sukcesas eĉ sin vendi, sin rifuĝas nokte en preĝejon kaj tie memoras. Nur la konkludo, malĝusta aŭ maltrafa alvoko de O'Haru per ŝia filo kaj forkuro estas rakontita je la tempo de l'estanteco. La rakontado mem, kun epizodoj tre- eble tromultnombraj kaj kun malrapida ritmo estas eble malfacile sekvata sen enuo de superflueca rigardanto. Sed atentostreĉo praviĝas, ĉar la prounda unueco de la filmo, kiu antaŭ ĉio estas morala kaj socia, igas la filmon pasie sekvata (aŭ sekvinda).

B) *Tekniko kaj Stilo.* Kiam oni parolas pri malrapideco oni devas precizigi : tiu malrapideco naskiĝas nek de la filmtranĉumo (la scenoj ne estas tro longaj) nek de la daŭro de la filmplanoj (la enscenigo ne estas tro senmova), sed de stilo de aktorgvidado tre japana, kiu insistas sur la daŭro de la aktorgestoj kaj sur la aktorreagoj. Ankaŭ, Mizoguŝi, kiu estis pentristo, ekĝuis videblan plezuron por komponi siajn kadradojn kaj perfektigi siajn fotojn, tre ofte mirindajn pro ekvilibro, diskreteco kaj travidebleco ; sed, ilia beleco mem malhelpas iomete al eleganteco de la rakontado. Tiu rakontado tro fluida ne kaptas sufiĉe la atenton ; nur kelkaj mirindaj scenoj, kiel la morto de Katsunosoke korkroĉas.

Filmsignifo.

Nur ĝia temo savas finfine « O'Haru » de distinginda enuo. Tiu temo devenas de romano de la XVIIa jarcento, skribita de Sajkaku Ibara, kiu estis revolucia aŭtoro ; li anstataŭigis la kortegan literaturon laŭmodan tiam, per pli populara inspirado. Tiu fonto certe plaĉis al Mizoguŝi, kiu aliĝis en la jaroj 30 — al la « revolucia filmisto-asocio ». Tiu asocio estis kreita por apogi la influon de la sovjeta filmarto. Fakte oni povus citi ĉi tiun frazon de Marx, kiel apologon de O'Haru : « la burĝaj frazoj sur familio kaj edukado, sur amligiloj inter infanoj kaj parencoj fariĝas des pli fiaj, kiam la granda industrio detruas pli komplete ĉiujn famililigilojn ĉe la proletoj, kaj kiam la infanoj fariĝas nur komercartikloj aŭ laborinstrumentoj ».

Tial, la historia transpozicio de tiu temo, estus por Mizoguŝi nura alibio. Sed oni ne devas pensi, ke O'Haru estas filmo de partiano. Ĝia grandanimeco savas ĝin de ĉia pedagogeco. Kaj la sceno, kiu morale estas la plej altnivela de la filmo restas tiu, jam citita, kiam la amanto de O'Haru antaŭ senkapigado, krias sian esperon en mondon, kie la amo estu finfine liberigita.

Tradukita de F.F.C.C. Dokumento.

J. M.

RADIO-AMATOROJ...

Atentu pri la noktomezo de 20-21-a de marto 1961, nova radiostacio en Zagreb ekfunkcios en Esperanto kun « invit-signo » proksimume jena : « YU2... ».

RECENZOJ

La redakcio recenzigas nur duope ricevitajn librojn, ĉar 1 ekzempleron ricevas la biblioteko.

VENCESLAV WINKLER. — La ŝtelita lampo. — El la slovena tradukis Joze Kozlevĉar. Illustris Ive Subic. Eld. Mladinska Knjiga 1960. Prezo : 3,75 NF. Grandformata, kartonita kaj ilustrita libro.

Fabela rakonto por infanoj, kun klasikaj orientaj temeroj (mirinda lampo, fluganta tapiŝo) sed moderna kadro kaj ekspresionistaj ilustraĵoj, videble inspiritaj de la Modigliania stilo. La rabisto havas, kiel decas, abomenindan aspekton. Kiel « pozitivaj » herooj ludas infanoj kaj milicano (= policisto) ; ĉi-lasta sur la lasta bildo aperas simbole kiel gardanto de la mirinda lampo, kiu servas kiel pacigilo inter la civitanoj.

La pedagogia valoro de tiu libro estas dubinda ; tamen, ĝi certe interesos 7-10 jarajn infanojn.

Michel Duc Goninaz.

⁂

ANTON JUGOV. — Por senarmiĝo, por paco kaj amikeco inter la popoloj. — Raporto antaŭ la kvina eksterordinara sesio de la Parlamento de Popola Respubliko Bulgario. 7-a de marto 1960. Eldonejo de literaturo en Fremdaj Ligvoj, Sofio 1960, 27 p.

Kion promesas la titolo, tion donas la enhavo. Finiĝas per entuziasmaj daŭraj aplaŭdoj ! Prezo neindikita.

M. D.

⁂

MEMORLIBRO PRI LA ZAMENHOF-JARO. — Redaktita de Pr. D-ro Ivo Lapenna. Eld. Centro de Esploro kaj Dokumentado de U.E.A. — Londono 1960, 104 p., + 16 paĝoj da fotoj.

Tiu grandformata kaj eleganta libro enhavas, krom la oficialaj dokumentoj de UEA por la Zamenhof-Jaro, serion da artikoloj pri Zamenhof kaj la Internacia Lingvo. Tiuj materialoj estis ĝenerale jam eldonitaj aparte de CED aŭ publikigitaj en la revuo « Esperanto ».

La kolektado de artikoloj pri Zamenhof verkitaj de diversaj aŭtoroj neeviteble kondukis al rediroj : iom tede estas ekscii preskaŭ ĉe ĉiu paĝo pri la naskiĝdato de la Majstro, la facileco kaj fleksebleco de la lingvo kaj la rezolucio de UNESKO. Pri Zamenhof mem plene sufiĉus la artikolo de Waringhien, sinteza prezento de la kariero kaj personeco de Zamenhof, kompletigita de la riĉaj Biografiaj Informoj kompilitaj de Roland Jossinet.

Pri la lingvo mem, Prof. Bokarev majstre prezentas en mallonga artikolo la « kelkajn trajtojn de Esperanto, kiuj karakterizas ĝin kiel principe pli taŭgan rimedon de interkompreno, ol multajn aliajn projektojn de lingvo internacia ». Li akcentas la sistemon de vortderivado, la « sintaksan diafanecon » (ŝulditan al la morfologiaj karakteriziloj), la liberan vortordon (kiu necesigas akuzativon kaj varieblajn adjektivojn) kaj la fonetikan ortografion. Ĉiuj tiuj trajtoj montras, ke ĉefe gravas en Esperanto la sistemeco kaj struktureco, dum la naturalismaj projektoj preskaŭ ekskluzive okupiĝis pri la vortaraj kaj etimologiaj problemoj.

La centron de la libro okupas tri gravaj studoj. Marjorie Boulton koncize sed trafe analizas la originalajn versaĵojn de « Zamenhof — pionira poeto », prave atentigante, ke la plej bonaj el ili estas la plej personaj — *Mia penso, Ho, Mia kor', Pluvo* — kaj ke ĉi tiu lasta prezentis novan promeson, kiu bedaŭrinde neniam plenumiĝis. En « Integro kaj latentoj en la verko de Zamenhof », John Francis montras kiel la stilo de Zamenhof, aparte en lia poezio, estas deirpunkto por la estonta evoluo (tio estas la difino de klasika stilo). William Auld, post konstato, ke multaj valoraj verkoj estas nekonataj ĉar skribitaj en lingvoj samtempe malmulte disvastigitaj kaj malmulte tradukitaj, demonstras la eblecon de la Internacia Lingvo servi kiel belarta tradukilo. Sekvas komparaj specimenoj de poemtradukoj (La Albatro de Baudelaire, La Tigro de William Blake kaj Anĉaro de Puŝkin).

La sinteno de L. Tolstoj al Esperanto estas ilustrita per tekstoj kaj faktoj ĝis nun malmulte konataj.

La mallonga studo de Preston Davis pri « Esperanto kaj la Teorio de Komunikado » atentigas pri ankoraŭ malmulte esplorita sed interesega temo, kiu kondukas al la problemo de la meĥanika tradukado, kaj kiu meritus pli detalajn studojn. Interalie, necesus pliklarigi la nocion de « superflueco ».

Menciindaj ankaŭ estas kelkaj artikoloj pri la uzado de la Internacia Lingvo sur la scienca kampo kaj la energia pledo de F. Moravec pri « La Internacia Lingvo kiel familia lingvo », demando, kiu estas la plej grava, eble la sole esenca el ĉiuj pli malpli gurditaj « problemoj » de la Esperanto-Movado.

La libro estas emajlita de diversaj citaĵoj kaj eroj, el kiuj distingiĝas kelkaj proverboj de Zamenhof (parenteze, kiam oni reeldonos la « Proverbaron Esperantan » ?) kaj la « ĉarmaj rimoj por infanoj ».

Finiĝas la libro post multnombraj fotoj pri Zamenhof kaj pri la celebrado de la centjara datreveno.

En tiu miksopoto ĉiu trovos ion laŭ sia gusto ; ĉiu trovos ankaŭ ion novan por lerni. Tiu memorlibro ne estas nura memoraĵo, sed ankaŭ fonto de estimindaj informoj.

Michel Duc Goninaz.

DU PROSPEKTOJ :

Korčulanski Muzej (urba muzeo en Korčula).

Danke iniciaton de S-ro Marinko Givoje la antaŭ nelonge fondita urba muzeo en malgranda sed turisme grava dalmata loko Korčula, sur la samnoma insulo, eldonis okpaĝan prospekton, ilustritan per kvin belaj fotoj. Post la kroat-lingvaj tekstoj venas tradukoj kaj resumoj en lingvoj germana, franca kaj Esperanto, ampleksaj, ĉar presitaj per pli malgrandaj litertipoj.

Unuopaj ekzempleroj de la broŝuro estas haveblaj kontraŭ du respondkuponoj ĉe S-ro Marinko Givoje, Gornji trg 31, Ljubljana, Jugoslavio.

Ravenna (Esperanta gvidlibro, dua eldono).

Tridekdupaĝa lukse ilustrita per tridek bildoj kaj du mapoj gvidilo tra la konata norditala urbo, vera trezorujo por la amantoj de bizanca kaj mezepoka arto. La tekston tradukis la (antaŭ nelonge mortinta) pastro M. Carolfi.

La broŝuro estas ricevebla de Ravena Esperanto-Grupo, P. Anita Garibaldi 1, Italio, (aŭ de Azienda Autonoma di Soggiorno e Turismo, Via XIII Giugno, 2 a, Ravenna).

HISTORIPOLITIKA VERKETO PRI AKTUALA PROBLEMO :

Sudtirolo en la jaro 1960.

Sesdekkvarpaĝa broŝuro verkita originale en Esperanto de « simpla malnov-aŭstriano », S-ro Hugo Steiner. Entenas aron da politikaj deklaroj de ĉefe aŭstriaj kaj italaj politikistoj pri nuntempe norditala teritorio, por kiu Aŭstrio postulas memdecidrajton. La aferon oni diskutis antaŭ nelonge ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj laŭ nia opinio devas jam trovi justan solvon por Sudtirolo.

DU PRILINGVAJ STUDOJ :

Opinio pri la **ata-ita** problemo.

Dekpaĝan esperantologian traktajeton pri daŭre diskutata gramatika regulo verkis la konata japana esperantisto S-ro Teruo Mikami (1959) post tralego de l'unua kajero de la tria eldono de « PLENA GRAMATIKO » ; ĝi estas ricevebla kontraŭ du respondkuponoj ĉe la aŭtoro (p/d « Oomoto », Kameoka, Kioto-hu, Japanio). Tie ĉi ni ne analizos detale lian tezon, ĉar « Franca Esperantisto » pli detale pritraktos la temon en aparta artikolo pri la participoj.

Pri landnomoj (dua eldono). Resuma Esperantigo de du ĉapitroj el tezo pri Propraj Nomoj, aperintaj en « The British Esperantist » (1947-1948).

En okpaĝa broŝureto la konata esperantisto veterano S-ro M.C. Butler prezentas detale la Zamenhofan landnoman sistemon kaj la tezojn pri alternativoj al — **ujo**. Kiel oni scias, la ĉefa el ili estas enkonduko de — **io**. La aŭtoro koncize resumis la historion de la diskuto kontraŭ kaj por ĝi. En la kadro de tiu ĉi recenzo detala ekzameno de la problemo pri — **io** estas nenecesa, ĉar laŭ nia opinio ĝi ne devas esti konsiderata aparte, sed ja en pli vasta kadro de pritrakto pri ĉiuj kvazaŭafiksoj (vidu la artikolon de D-ro C.A. ten Seldam en la unua volumo de « Esperantologio »).

Ni povas nur diri tie ĉi, ke la uzo de formoj plene internaciaj, kiel Francio, Italio, Rusio, k.t.p., ŝajnas al ni plene laŭfundamenta, ĉar konformata al paragrafo 15 de la tiea Gramatiko — sendepende de la demando pri klasifo de — **io**, kiu estas multe malpli grava ol la rekomendindeco de formoj por landnomoj pli kompreneblaj kaj akcepteblaj, pro sia internacieco, ol la tradiciaj esprimoj, tre ofte kritikitaj.

Paul CILIGA.

DU KATALOGOJ POR ESPERANTISTAJ BIBLIOFILO :

Kolektoj de INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO (Hofburg, Wien 1, Aŭstrio). PARTO II : Sistema Katalogo pri la presajoj de la NE-Esperanto-ARTEFARITAJ LINGVOJ (Volapük, Ido, Interlingue, Interlingua ktp. ktp., laŭ la Internacia Dekuma Klasifo). Verkita de Hugo Steiner, fondinto kaj direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo, Wien (1958).

Grandformata naŭdekkvar-paĝa kompilaĵo pri diverssistemaj eldonaĵoj en aro da konstruitaj lingvoj ekster Esperanto. Prezo kun afranko : 14 respondkuponoj. (Oni memoru la ekziston de l'unua parto de la sama katalogo, dediĉita al la Esperanto-Literaturo, 461-paĝa ; prezo afrankite : 45 respondkuponoj, aŭ egalvaloro en naciaj bankbiletoj). Ankoraŭ aperos tria parto, nome Alfabeta Katalogo, verŝajne 500-paĝa, laŭ la nomoj de aŭtoroj aŭ verkoj.

« Bibliophilos », organo de librokolektantoj en Finnlando, dediĉis numeron 2-1959 al la Finnlanda Esperanto-literaturo (paĝoj 21 ĝis 40 en tiu ĉi presita kajero). Verkis bibliotekistino fil. mag. Hellevi Aimola, Universitata Biblioteko, Helsinki (Finnlando). Ricevebla kontraŭ unu respondkupono de Fondaĵo Esperanto, Matinkyla, Finnlando.

★★★

ESPERANTO-FILATELO

Estis ĵus eldonita en Italujo serio de 22 poŝtkartoj, kiuj prezentas grandformate ĉiujn poŝtmarkojn ĝis nun eldonitajn kun teksto en Esperanto.

La serio kostas, inkluzive la sendelspezojn al eksterlando per registrita letero, 15 internaciajn poŝtajn respondkuponojn.

Skribi al : Sicilia Delegacio de Itala Esperanto-Federacio, Corso Vittorio Veneto 92, Ragusa (Italujo).

★

BIBLIOTEKO CIRKULANTA SAO MIGUEL, malfermita al la publiko ĉiutage, deziras starigi Esperanto-fakon. Estas urĝe petata la kunlaboro de la tutmonda esperantistaro. Elsendu almenaŭ unu libron kaj vi kontribuos por la disvastigo de Esperanto kaj *nepre ricevos memoraĵon el Brazilo*. Nia adreso : Rua Cap. Francisco Isaias de Carvalho, 6 São Miguel Paulista,, S. Paulo, Brazilo.

HONORAJ DISTINGAĴOJ

S-ro JOLY ricevis la Labor-medalon el orita arĝento, pro longaj servoj en la urbdomo de Besançon.

S-ro E. CHICOT, inĝeniero pri ŝipkonstruado en Parizo, kunlaboris en la desegnado de l' nova ŝipego « France », antaŭ nelonge lanĉita ; ĉi-okaze li estis ordenita Kavaliro de la Honor-Legio. Li krome estas aŭtoro de verko (Konstruado de komercipo) aperinta en 1960 kaj destinita al la lernantoj pri navigado kaj al la teknikistoj de Ŝip-Konstruado kaj -Armado.

46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Harrogate — 5-12 aŭgusto 1961 — Britujo

Korespondadreso : 46-a Universala Kongreso de Esperanto — Harrogate.

Telegrafo : Esperanto Harrogate.

Banko : Midland Bank Ltd. Harrogate.

Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario « Oriento-Okcidento » (Londono 2-4 aŭgusto 1961) : S-ro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, Londono N. 5.

17-a T.E.J.O.-Kongreso (12-19 aŭgusto 1961) : S-ro T.G. 90 Ross Street, Cambridge.

OFICIALA KOMUNIKO

GLUMARKOJ : La Loka Kongresa Komitato eldonis kvarkoloran glumarkon kun emblemo de la 46-a Universala Kongreso. La glumarkoj estas aĉeteblaj ĉe la Kongresaj Perantoj, ĉe la Libro-Servoj kaj Landaj Asocioj, ĉe U.E.A. kaj ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate je prezo de po 1 ŝilingo kaj 6 pencoj por folio de 25 markoj (1,50 NF.).

BAZA ARTIKOLO : Baza artikolo pri la kongresa urbo kun enciklopediaj notoj pri Britujo estas senpage havebla — por informvesperoj ĉe lokaj societoj — rekte de la Kongresa Oficejo.

SONBENDO : Lokaj Esperanto-societoj, regule aliĝintaj al Landaj Asocioj, povas senpage ricevi de la Kongresa Oficejo 30-minutan sonbendon por grupaj vesperoj. La sonbendo enhavas intervjuon kun la Prezidanto de L.K.K., paroladon de la Generala Sekretario de U.E.A., alvokon de esperantista infano kaj muzikan programon.

FAKAJ KUNVENOJ : Fakaj asocioj, dezirantaj okazigi fakajn kunvenojn dum la Universala Kongreso, estas petitaj informi pri tio la Kongresan Komitaton ĝis la 31-a de decembro 1960.

SENPAGAJ PARTOPRENOJ : Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petitaj anonci sin ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.

T.E.J.O.-KONGRESO : La Estraro de T.E.J.O. informas, ke kontraŭe al la antaŭa anonco la 17-a T.E.J.O.-Kongreso okazos en Wokingham (Britujo) de la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto 1961.

ANTAŬKONGRESO : Samtempe kun la Seminario « Oriento-Okcidento », okazos en Londono de la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 1961 la oficiala Antaŭkongreso, sub aŭspicioj de U.E.A. kaj de la Londona Klubo.

HONGRA PROTEKTANTO : Lordo Boyd Orr, Nobel-pac-premiito, akceptis esti la Alta Protektanto de la 46-a Universala Kongreso de Esperanto.

PROSPEKTO PRI HARROGATE : La Urbo Harrogate decidis eldoni en Esperanto plurkoloran turisman prospekton. Interesitoj povas mendi la prospekton ĉe la Kongresa Oficejo, aldonante unu respondkuponon por la afrankkostoj.

LOĜADO EN HARROGATE : Jen provizoraj prezoj por loĝado en Harrogate :

Hoteloj	tranokto kun matenmanĝo	kompleta pensiono
1-a kategorio	32-6 ĝis 42-6	47-6 ĝis 60
2-a kategorio	20 ĝis 27-6	25-6 ĝis 45
aliaj kategorio	14	21
Pensionoj	ek de 12-6	ek de 17-6

La matenmanĝo en Britujo estas kutime iom vasta kaj abunda.

BRITA VESPERO : La Loka Kongresa Komitato decidis, ke dum la Universala Kongreso okazu « Brita Vespero » kun enkonduka prezento pri la karakterizoj de la Kongreslando kaj respondado al liberaj demandoj.

CSEH-SEMINARIO : La Internacia Cseh-Seminario okazos en Harrogate dum la Kongresa semajno. Ĝi daŭros 15 horojn. Kotizo : 32 steloj, pageblaj ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Hago, aŭ (por britoj) ĉe S-ro H. Holmes, 38 Fillebrook Road, London E. 11.

PROSPEKTOJ EN ESPERANTO : La Kongresa Komitato estas preta aldoni turismajn prospektojn en Esperanto al la kongresaj dokumentoj. Alsendoj devas esti antaŭe interkonsentitaj kun la Kongresa Oficejo en Harrogate.

SPECIALA NUMERO DE « BRITISH ESPERANTIST » : Brita Esperantista Asocio decidis dediĉi la januaran numeron de sia organo « British Esperantist » al informado pri la Universala Kongreso, Arta Festivalo kaj Kongreslokoj. La numero estas senpage ricevebla de la Kongresa Oficejo kontraŭ alsendo de du internaciaj respondkuponoj por la poŝtaj elspezoj.

PARKEJOJ : La esperantistaj aŭtomobilistoj povos senpage utiligi la parkejojn en Harrogate.

OFICIALA AKCEPTO : La Urbo Harrogate decidis akcepti kaj regali la tutan kongresanaron dum vespera muzika programo.

SPECIALAJ FAVOROJ : La Urbo Harrogate decidis, ke la kongresanoj ĝuos jenajn avantaĝojn dum sia restado en Harrogate :

1. Senpagan eniradon en la Sunan Pavilonon kaj Sunan Kolonaron (normala prezo : 6 pencojn).
2. Senpagan eniradon en la Lounge Hall (normala prezo : 6 pencojn).
3. Senpagan tenisludadon en la Valaj Gardenoj (normala prezo : 2 ŝilingoj kaj 6 pencojn hore).
4. Senpagan uzadon de la miniatura Golfejo kaj aliaj ludejoj (normala prezo : 1 ŝilingon por ludo).
5. Senpagan eniradon en la Naĝbasenon (normala prezo : 10 pencojn hore).

FAKAJ KUNVENOJ : Anoncis fakkunvenon :

- — Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj : publika pedagogia diskuto « Edukado por internacia kompreno en lernejoj ». (Adreso : 183, Woodlands Park Road, Birmingahm 30, Britujo).
- — Veterana Esperantista Klubo : « Memorigo pri frujaraj agadoj » (Adreso : S-ro Lewins, 33 Kingscroft Ave., Dunstable 674, Britujo).
- — Internacio de Militrezistanoj. (Adreso : 88 Park Aevenue Enfield, Middl., Britujo).
- — Rotaria Klubo. (Adreso : Maurice Lewins, 33 Kingscroft Avenue, Durstable, Britujo).
- — Kristana Esperantista Ligo Internacia : « Aktualaj problemoj en la mondo ». (Adreso : Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando).

ARTA PROGRAMO POR AMATOROJ : En la kadro de la Arta Festivalo okazos Arta Programo rezervita al esperantistaj amatoraj artistoj. Rajtos partopreni

nur altnivelaj amatoroj (debutantoj ne estos akceptitaj), kiuj kutimas prezenti programon. La amatora arango konsistos el skeĉoj, unuaktaj teatraĵoj (maksimuma ludodaŭro : 15 minutojn), kantoj, ĥoroj, instrumenta ludado, k.s. (maksimuma ludodaŭro : 6 minutojn). Sinproponoj de individuaj amatoraj artistoj aŭ grupoj devos atingi la Kongresan Oficejon en Harrogate antaŭ la 28-a de februaro 1961. Ĉiu sinpropono devos esti akompanita de rekomendo de la landa Esperanto-Asocio aŭ de loka arta instanco kaj kompletigita per ĉiu necesa referenco. Neniu kandidato estos allasita al la programo, kiu ne respektos la fiksitan limdaton kaj la aliajn kondiĉojn.

STATISTIKO (ĝis fino de novembro) : Argentino 2, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 9, Brazilo 4, Britujo 154, Bulgarujo 2, Danlando 5, Finnlando 3, Francujo 35, Germanujo 11, Hispanujo 2, Hngarujo 1, Irlando 1, Israelo 3, Italujo 16, Japanujo 2, Jugoslavio 18, Maroko 4, Monako 4, Nederlando 7, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 7, Svedujo 12, Svisujo 5, Sovetunio 1, Usono 2. Entute 318 el 28 landoj (Pasintjare 304 el 28 landoj).

G.C. FIGHIERA,
Konstanta Kongresa Sekretario.

ET POURTANT, CERTAINS PRÉTENDENT QUE LES MOYENS AUDIO-VISUELS ONT RÉSOLU LE PROBLÈME !

Nous étions à Munich sur l'immense place Térésia pour l'ouverture solennelle du *37e Congrès eucharistique international*.

Malgré les grandioses cérémonies de ce congrès et la piété certaine des participants, nous n'avons pu nous empêcher de faire des comparaisons !

Des conférences, des sermons magnifiques ont sans doute été prononcés, mais il fallait posséder parfaitement l'allemand (pratiquement la langue du congrès) pour les suivre.

Comme nous étions un certain nombre d'espérantistes, membres de Pax Christi, à Gräfelfing, nous avions décidé d'assister ensemble à une conférence de ce mouvement sur : « *Le Pain de l'Unité et la Paix* ». Une « *installation optique simultanée* » devait permettre de suivre en français, en anglais, en italien et en espagnol, la conférence faite en allemand. C'était épuisant de suivre le texte sur l'écran, mais cela en valait la peine. Malheureusement, le système s'est bientôt arrêté, nous avons patienté de notre mieux, attendant la fin, évitant de bailler par contagion, car visiblement la moitié de la salle ne suivait pas la conférence !

Le samedi, j'avais choisi avec quelques amis d'aller écouter un religieux arabe de Jordanie. Nouvelle déception ! Le Père s'exprimait paraît-il en très bon allemand mais le public quittait peu à peu la salle. Et malgré quelques chœurs arabes (assez faibles d'ailleurs) qui entrecoupaient la conférence, nous n'avons pas eu le courage de rester longtemps...

J. B. (el « Franca Katolika Esperantisto » okt. 1960).

SUBTRAHO

Iam, la fama angla humuristo Bernard Shaw volis pruvi, ke li trapasas sian tutan jaron en ferioj :

« En unu jaro, li diris, estas 365 tagoj de 24 horoj. Sed la duono de tiu tempo estas reprezentita per la noktoj, t.-e. la valoro de 182 tagoj. Ĉiutage, mi dediĉas al la manĝoj 4 horojn, do 1460 horojn por la tuta jaro, t.-e. la valoro de 60 tagoj. Restas do 123 tagoj. Sed, se mi dekalkulas 52 dimanĉojn, restas 71 ; kaj post dekalkulado de la sabatoj restas nur 10, el kiuj mi subtrahas la 15 tagojn de miaj ĉiujaraj ferioj. Restas 4 tagoj, minus 3 tagoj de nelaboro pro malsano. Fine, restas nur unu tago, sed ĉi tiu estas la 1-a de majo, dato de la Laborfesto ».

A. CHERPILLOD.



Leganto komunikas :

En la revuo « l'Histoire pour Tous », kies redaktoro estas Alain Decaux, ĉe la 3?1-a paĝo troviĝas foto. Sur ĝi oni legas « ne brulu vian manĝon », frazon skribitan sur nigra tabulo ; sub ĝi tekstas : « C'est en Espéranto que l'on informa *Farman* de la situation de la course ». Tio ĉi aperis en la 4-a (aŭgusta) numero de la revuo.

Jacky DUMAS



ANONCO

AL LETERVESPERO en marto 1960, kiun aranĝos du grandaj esperantaj grupoj de polaj instruistoj en Wroclaw, sendu viajn salutkartojn, leterojn, korespondproponojn kaj diversspecajn esperantaĵojn, per kiuj vi helpos propagandi Esperanton en instruistajn mediojn kaj varbi novajn adeptojn. Bonvolu skribi amase. Respondo garantiita.

Nia adreso : *Zwiazek Nauczycielstwa Polskiego, Oddzial we Wroclawiu; ul. Nauczycielska 2; Wroclaw; Pollando.*

Membres à vie de U.E.F.

Frato Marmou.
S-ro Bachelier.
S-ro Lienhardt.

Bienfaiteurs.


S-ro Jelenc.
S-ro Noby.
S-ro P. Petit.
S-ro J. Guillaume.
S-ro Broise.

Dons.

S-ino Buisson (por la sidejo) .... 5 NF
S-ro Cueno .... 2 NF
S-ro P. Petit .... 10 NF

ROZA LIBRETO...

Ges-roj G. Jacquet havas la plezuron informi pri la naskiĝo de ilia filino SYLVIE (31-10-60).



(Kliŝo « Syndicat d'Initiative ».

LE PONT D'ARC

GRAVA KOMUNIKO

La urbestraro de Vallon-Pont d'Arc decidis unuanime doni la nomon de D-ro ZAMENHOF al la publika kampadejo de tiu ĉi bela urbo situanta apud rivero Ardèche en mirige pentrinda turista regiono.

La inaŭgurado okazos venontjare la 23-an de julio kun la helpo de diversaj instancoj kaj de la Radio-Televido. Ĉar temas pri la unua tiaspeca kaj grava manifestacio ni invitas ĉiujn esperantistojn, tendumantojn aŭ ne :

1°) Sendi gratul leteron aŭ karton al S-ro Louis AGERON, urbestro de Vallon-Pont d'Arc.

2°) Plani partopreni en la Internacia esperantista Semajno, kiu estos organizita kaj kies tre alloga ĉiutaga programo estos pli malfrue diskonigita. Komunmanĝejo kaj loĝego estos antaŭviditaj.

3°) Jam de nun enskribiĝi por ricevi pliajn informojn skribante al :

GROUPE ESPERANTISTE DU VIVARAIS,
Chemin de Baza,
AUBENAS
(Ardèche).

(Aldoni 2 poŝtmarkojn je 0,25 NF aŭ re5spondkupono por respondo).

ENIGMO N° 9

Per la ĉi-postaj literoj, vi formu proverbon enhavantan dekunu vortojn :

A A A A   D D   E E E E   F F   G G
I I I   J   K   L L   M M   N N N N
O O O O   P P   R R R R   S S S S
T T T   U U U U U   Z

Limdato : 29-2-1961 por la sendo de la solvo al S-ro J.A. ROUSSEAU, 64, avenue de Châtillon, PARIS.

Solvo de la enigmo n° 5 :

La teksto :

G.F. MAKKINK. — Ludadi sur vulkano : Alia eblo estas, ke la publiko diros : « Nu, ni lasu la lingvistojn diskutantaj, ni bezonas tuj rimedon kaj ĉar Esperanto estas bonege funkcianta, ni akceptas ĝin malgraŭ aŭ eĉ kontraŭ la lingvistoj.

La vortoj :

Gliptotek, Festeni, Martelbat, Adresi, Klisteroj, Kulpas, Institutoj, Naŭn, Karesa, Lulil, Uragana, Dozi, Agapoj, Daŭb, Intensa, Saĝec, Ungvent, Riĉe, Vasalec, Omnibus, Laŭb, Kolĉik, Ananasoj, Naninoj, Oniks.

Solvo de la enigmo n° 6 :

La proverbo :


Rekomendo Kondukas al Plendo.

La vortoj :

Recepto pEruko linKo gitarO liMbo rEkoni rikaNi jarDo nudelO Krespo Ordono doNus aDmoni lagUno Karoto ŝAlupo glasiSo pAsero popLo Planko poLvo panElo kareNo lunDo Ornamo.

Publika Gardeno ĉe la Urbdomo de Epernay (Kongresurbo)

(Kliŝo: Agence Havas).



CATALOGUE U. E. F.

JANVIER 1961

	NF
Affiche 40 × 60	0,10
Affiche 80 × 60 (textes divers)	1,00
Blason tissu « Esperanto parolata »	2,60
Carte postale « Esperanto »	0,10
Carte postale portrait du Dr Zamenhof	0,30
Carte postale avec étoile verte	0,05
Enveloppe avec étoile verte	0,05
Fanion en toile pour bicyclette ou voiture	1,40
Insigne (bouton ou broche)	1,10
Papier à lettres avec étoile verte, bloc de 100 feuilles lignées ou non, format 13,5 × 21	2,20
format 21 × 27	3,20
Photographie du Dr Zamenhof 10,5 × 16	0,50
Tract grammaire et vocabulaire	0,10
L'Esperanto cet inconnu (Ribot)	1,25
Valeur pédagogique de l'Esperanto	0,60
Programme des examens	0,25

ETUDE ET ENSEIGNEMENT

ABC de Waringhien	1,50
Dialekto, Dialektiko (Dalmaŭ)	3,50
Esperanto kaj Lernejo (Slovenia-Ligo)	10,00
Esperanto Legolibro (Migliorini)	3,75
Esperanto-Manuel (Chavet-Warnier) avec corrigés	5,00
Esperanto por Infanoj (Solomon)	2,50
L'Espéranto facile (Gaume)	3,00
Konversacia Literaturo (8 broch. méthode directe)	1,80
Manuel d'Etude (Couteaux) avec corrigés	4,50
Manuel d'Initiation (Thaillet)	1,50
Ni parolu en Esperanto (Ribot)	4,00
d° corrigés	0,70
Plena Gramatiko (vol. I)	12,00
Privilegia Vojo al Lingvoscio (Setala)	6,00
Slosiloj diversaj	0,40
Traduko de la Provtekstoj en la Gvidlibro	1,00
Unua Legolibro (Kabe)	1,75
Universala Legolibro (Fricke)	1,75

DICTIONNAIRES, LEXIQUES ET VOCABULAIRES

Dictionnaire Français-Esperanto (Grosjean-Maupin)	8,10
Fervoja Terminaro (Rosher)	1,70
Gastronomia Terminaro	4,55
Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Waringhien)	28,30
Lexique Esperanto-Français (Léger)	5,40
Matematika Terminaro	1,25
Militista Vortareto	1,20
Les Mots Espéranto groupés (Bobin)	1,50
Naŭlingva Etimologia Leksikono (Bastien)	10,00
Plena Vortaro	15,00
Scienca Terminaro	19,60
Vocabulaire de poche (Bastien)	2,40

LA MOVADO (Lingvo, Historio)

Le Docteur Esperanto (M. Ziolkowska)	6,50
La Esperanto Klubo (Malmgren)	1,10
La Esperanto Movado (Stop-Bowitz kaj Isbrucker)	2,80

	NF
Historio de la Lingvo Esperanto (Privat)	8,10
La Internacia Lingvo (Lapenna), bind	8,00
Leteroj de L.L. Zamenhof (Waringhien) I kaj II binditaj	19,00
Originala Verkaro de Zamenhof, bindita	15,75
Per Kio ni amuzu nin ? (Rosenberg-Malmgren)	1,10
Retoriko (Lapenna), bindita	15,40
Vivo de Zamenhof (Privat)	4,50

LITERATURO (Prozajoj)

Abismoj originala romano (Jean Forge)	3,15
Akbar (Limburg Brouwer), bindita	5,00
La Alaska Stafeto (Omelka), bindita	4,20
La alia Pasinteco (Bulthuis), bindita	7,00
La Amo en la Jaro Dekmil (Ignotus), bindita	5,25
Angla Antologio (Auld kaj Rossetti)	14,00
Anstataŭa Edzino (Maxwel), bindita	4,20
Aventuroj de Malspertulo (Reitzel), bindita	0,60
La Aventuroj de Marteno Drake (G. Norway), bindita.	4,20
La Aventuroj de S-ro Longkrurulo (Uitterdijk)	1,75
Barbro kaj Eriko (Schneider kaj Carlsson)	0,75
Brulanta Sekreto (Stefan Zweig)	3,30
Colomba (Mérimée)	1,70
Doktoro Dorner (Egurrup)	5,60
El la Maniko (Rossetti)	10,00
Eseoj I (Waringhien)	10,00
Fabiola (Kardinalo Wiseman)	6,30
La Firmao de la Kato kiu pilkludas (Balzac)	1,05
La Forto de l'Vero (Adi)	3,30
La Ĝoja Podio (R. Schwartz)	4,50
Les Héros Existentialistes dans l'œuvre de J.P. Sartre (Colette Llech-Walter) texte bilingue	2,00
La Hundo Kruso (Ballantyne)	2,10
Infanoj en Torento (St. Engholm) I kaj II kune	5,60
Invito al Ĉielo (J.D. Sayers)	6,30
Karlo (Privat)	1,05
La Karnavalo kaj la Somnambulino (Immermann)	3,30
Kiso de la Reĝino (Naĵivin)	3,30
Koko krias jam! (Szilagyi)	10,00
Kredu min Sinjorino! (Rossetti), bindita	7,80
Lingvo kaj Vivo (Waringhien), bindita	20,00
Miru, Pensu, Ridu (Bennemann), bindita	7,50
Misteroj de l'Vivo (Bogh-Hogsted)	3,50
Morto de Trajno (Crofts), bindita	7,50
La Normandaj Rakontoj (Maupassant), bindita	16,80
Novaj Esperanto-Historietoj (div. aŭtoroj)	2,50
Palaco de Danĝero (Mabel Wagnalls), bindita	4,90
Princino de Marso (Burroughs)	1,70
La Princo kaj Betty (Wodehouse)	1,70
Saltego trans Jarmiloj (Jean Forge)	3,15
Sep Vangofrapoj (Aszlanyi)	3,30
Taglibro de Anne Franck, bindita	10,75
La Tempo-Maŝino (H.G. Wells)	1,70
Victoria (Knut Hamson)	4,20
La Virineto en Bluo (Mason Stuttard)	3,30
Ĉina Antologio	10,00

TEATRO KAJ POEZIO

	NF
Antonio kaj Kleopatro (Shakespeare)	2,10
La Bapto de Caro Vladimir (Havliĉek)	10,00
Eroj (M. Boulton)	12,50
Esperanta Antologio. Poemoj, bindita 21,50, broŝ.	18,50
Fabloj de La Fontaine	2,00
La Floroj de l'Malbono (Beaudelaire)	13,40
La Gajaj Edzinoj de Windsor (Shakespeare)	2,10
Georgo Dandin (Molière)	2,65
La Infana Raso (W. Auld)	10,00
Jozefo (Applebaum)	5,60
Kontralte (M. Boulton)	10,00
La Mokindaj Preciozulinoj (Molière)	1,20
Pasko (Strindberg)	5,50
Peer Gynt (Ibsen), bindita	11,20
Poemoj de Omar Kajam	2,50
La Revizoro (Gogol)	4,30
Romeo kaj Julieto (Shakespeare)	2,10
Sinjoro Tadeo (Mickiewicz), bindita	8,50
Sonĝe sub Pomarbo (Baghy)	10,00
La Stranga Butiko (Schwartz)	2,80

RELIGIO KAJ FILOZOFIO

Maksimoj de la Rochefoucauld (franca kaj esperanta kune)	2,00
La Nova Testamento, bindita	2,50
Papo Pio X beata	3,35
Sankta Biblio, bindita	10,00
La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo (Dickens), bindita	5,00

SOCIOLOGIO KAJ POLITIKO

Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo (Lapenna)	7,00

	NF
Federala Sperto (E. Privat)	3,15

GEOGRAFIO — VOJAĜADO

Aŭstralio — Lando kaj Popolo	3,50
Ekspedicio Kon-Tiki (Heyerdahl), bindita	18,50
Kanako et Kananam (K.-G. Linton)	11,00
Tempesto super Akonkagvo (T. Sekelj)	10,00
Pariza Gvidlibro Ilustrita	2,50
De Parizo al Lazura Marbordo (Rétot)	1,60
Pola Folkoro (Grenkamp)	2,00
Adresaro por internaciaj vojaĝantoj (Rétot)	1,20

ARTO, KOMERCO, SCIENCO KAJ TEKNIKO

La Arto fariĝi Centjara (Wegener)	2,80
Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj (Neergaard)	15,40
Pri Bredado de Abeloj (Andersen)	4,20
La Vivo de la Plantoj (Neergaard)	11,20
Eta Interpretisto Franca (Rétot)	1,20

KANTOJ

Koncerta Kantaro (Brederode kaj Veldkamp)	3,85
Internacia Kantaro (Benneman) ...... vortoj	1,75
muziknotoj	4,55

GRAMOFONDISKOJ

Disque de prononciation	4,00
Parolado de Lapenna	8,50
Melodioj (La Espero, Ĉeriz'Tempo, Fontano klara)	12,00
Diversaj Melodioj (kvarvoĉe) I, II, III, ĉiu	9,00

Frais d'expédition et de poste :

20 % jusqu'à 10 fr.; 15 % jusqu'à 20 fr.; et 10 % au-dessus. Toutes les commandes sont à adresser, avec les fonds, à : Union Espérantiste Française, 34, rue de Chabrol, Paris (10e). C.C.P. 855-35 Paris.

RESTARIGO de K. S. M.

(koresponda servo mondskala de U. E. A.)

Kiel jam anoncite en novembra numero de « Esperanto » la koresponda servo de UEA denove funkcias. La antaŭa regularo ĉiam validas : t.e. ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi *sed ricevos rektan respondon* de la korespondservo *nur aldonante* internacian respondkuponon aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn por ĉiu petita adreso de korespondanto, ĉar K.S.M. disponas pri nenia monsubvencio.

Nova adreso de la Korespondservo : F-ino C. Hueter 12, rue des Jacobins, Clermont-Ferrand (P.-de-D.).

Anoncante vin al K.S.M. bonvolu doni pri vi mem la sekvantajn informojn :

Nomo, Antaŭnomo kaj kompleta adreso (preslitere) aĝo, profesio, ĉu edz(in)iĝinta aŭ ne...

Kun kiom da gekorespondantoj vi deziras korespondi kaj el kiaj landoj. Pri kiaj temoj.

Aliĝu multnombre, ĉar la celo de la korespondservo : havigi al la membroj ĉiujn deziratajn korespondantojn, povos esti atingita, nur kiam ĝi ampleksos milojn da geanoj el la tuta mondo.

Langres. — Imprimerie Moderne

Le Gérant : J. Guillaume